

27a jarkolekto - aŭgusto-septembro 2006/8-9
Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X



Samarkando: Perlo ĉe la Silka Vojo



- **VIKIPEDIO**
50 000 artikoloj!
- **HISTORIO**
Murdo aŭ sinmortigo
- **SPIRITA VIVO**
Ĉu edzino aŭ ne?

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustajoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Lingvo estas tiu, en kiu oni povas trovi multajn informojn **11**

Okaze de la apero de la 50 000a artikolo en Vikipedio, MONATO parolis kun kelkaj motoroj de la ĉiutage kreskanta esperantlingva enciklopedio, ne pri Esperanto, sed pri ĉiuj facetoj de la homa kono.



Monarĥo-mistero: ĉu murdo aŭ sinmortigo? **13**

Daŭre restas duboj pri la morto de la bavara reĝo Ludoviko 2a en 1886. Gugluloj, membroj de mistera sekto kun originoj en mezepoko, starigis krucon en la Starnberg-lagon tie, kie ili kredas, ke estas mortpafita la reĝo.

Perlo ĉe la Silka Vojo **17**



Samarkando! Eĉ mencio de tiu nomo elvokas misteron, fabelon, eĉ magion. Oni nomis la urbon „Romo de Oriento”, „Edeno de l' antikva Oriento”, „Perlo de l' islama mondo” ...

Bavario funebras pro Beppo Bruno **21**



En suda Germanio post 20a de majo 2006 dum pluraj semajnoj unuopa kaj unika „monstro” kaŭzis maltrankvilon: urso. Ĝi ne sciis, ke post la mortpafo de la lasta urso en 1835, neniu urso rajtas vivi libere en tiu „libera ŝtato” Bavario.

Maria Magdalena: ĉu edzino aŭ ne? **25**



Jen la fontoj el kiuj la aŭtoro Dan Brown venigas la pruvon, ke Jesuo estis la edzo de Maria Magdalena. La temo de la romano (laŭ la aŭtoro mem) estas esence, ke Jesuo edziĝis kaj naskis filinon, de kiu devenas la franca mervida dinastio kaj ĉiuj „falsaĵoj kaj altrudoj” de la kristana eklezio kun la Priorejo de Ciono kaj Opus Dei. Jen kiel estas konstruataj la pruvoj.

POLITIKO	
D.R. Kongo	8
Kiel eskapi la pasintecon	
Albanio	8
Kverelo neniam entombigita	
Slovenio	9
Tolaro ne plu tolerata	
Eŭropa Unio	9
Subskribo stabiliga	
MODERNA VIVO	
Togolando	10
Mur-muroj	
Albanio	10
Eksterlande eminentaj	
Togolando	10
Aver-aĝe ...	
Medicina turismo	10
Vikipedio	11
Grava lingvo estas tiu, en kiu oni povas trovi multajn informojn	
Germanio	13
Monarĥo-mistero: ĉu murdo aŭ sinmortigo?	
Litovio	15
Peza problemo	
Superstiĉoj	15
Ĝemeloj kaj goriloj	
Ĉinio	16
Protektu kaj riparu	
TURISMO	
Uzbekio	17
Perlo ĉe la Silka Vojo	
MEDIO	
Ursoj	21
Bavario funebras pro Beppo Bruno	
ESEO	
Jubile, jubilate, gargantuece palatkareseme	22
SPIRITA VIVO	
La Da-Vinci -kodo	25
Maria Magdalena: ĉu edzino aŭ ne?	
LIBROJ	
Prisilentita heroo	27
Andreo Cseh: legendo jam dum sia vivo	29
Unika vortaro por lernantoj	30
NOVELO	
Mallonga historio de la evonima milito	31
HOBIO	
Belgio.....	33
Genealogio	
<hr/>	
Abonoj	4
Enkonduko	5
Leteroj.....	6
El mia vidpunkto.....	7
Anoncetoj.....	35

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank, 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko traktata je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	25	5	10
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	50	5	9
Brazilo	EUR	23	25	5	10
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	25	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	25	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	42	5	10
Hungario	EUR	23	25	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	42	5	10
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6600	6900	860	1220
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	42	5	10
Kroatio	EUR	23	25	5	9
Latvio	EUR	23	25	5	9
Litovio	EUR	23	25	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	370	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalia	EUR	36	41	5	9
Rusio	EUR	23	25	5	9
Singapuro	EUR	41	42	5	10
Slovakio	EUR	23	25	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	42	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	71	82	9	14
Tajvano	EUR	41	42	5	10
Usono	USD	61	63	8	13
Bazo eŭropa	EUR	46	50	5	9
Bazo ekster-eŭropa	EUR	48	50	5	10

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiiilo +32 32 33 54 33.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: esperfed@ans.com.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variabi. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estono:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finnio:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Francio:** Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:** Hilde Maul, Pferser Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
- **Literatura-Servo "Espero",** Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
- **Hans Dieter Platz,** Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- **Wolfgang Schwanzer,** Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irano:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japanaj:** KLEGG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. Reto: kleg@mvf.biglobe.ne.jp.
- **Japano Esperanto-Instituto,** Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwoleskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Koreo:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperant@unitel.co.kr
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miauguau@racsa.co.cr
- **Kroato:** Kroato Esperantista Unuigo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. Reto: mbeLOSEV@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: laimius@fastlink.lt.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328@PKO BP XIV O/Wwa.
- **Ruslandaj:** Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
- **Mikaelo Ĉertilov,** Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:** Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
- **Sveda Esperanto-Federacio,** c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, S-242 94 Hörby. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Faks: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org
- **Venezuela:** Peter Jaimez, Apartado 3482, Caracas 1010A. Reto: peterjaimez@tutopia.com.



Unika biotopo

Ni estas jam meze en la turisma sezono en grandaj partoj de l' mondo. Se vi intencas viziti mezan Eŭropon kaj precipe Germanion, vi povos miri pri speciala biotopo, kiun kreis la historio de la pasinta jarcento. Ĉu vi memoras? Dum la plurjardeka periodo de tiel nomita malvarma milito Eŭropon tranĉis „fera kurteno”, kiu etendiĝis de Balta Maro ĝis Hungario. Ĝi disigis komunismajn landojn en orienta Eŭropo de okcidentaj landoj. Jam nur en Germanio ĝi longis 1393 kilometrojn. En la ĝis 200 metrojn larĝa mortiga zono oni ne nur instalas preskaŭ ne supereblan baraĵon kaj pavimitan vojlon laŭlonge de la zono por patrolantaj limgardistoj, sed ankaŭ enfosis grandan nombron da ter-minoj. Neniu rajtis loĝi tie aŭ agrikulturi. Mortis multaj homoj, kiuj volis fuĝi el orienta Germanio kaj tial provis superi la feran kurtenon, sed la naturo vivis komplete netuŝita kaj povis evolui laŭplaĉe. Elkreskis ĝangalo, en kiu troviĝas multaj maloftaj specioj de plantoj kaj bestoj, kiujn oni preskaŭ aŭ tute ne plu trovas en cetera Eŭropo. Kiam falis la fifama berlina muro kaj tiu fera kurteno, mediprotektantoj tuj ekaktivis; oni forigis ne nur la baraĵojn sed intertempe ankaŭ ĉiujn minojn, tiel ke ĉi-jare oni povis malmunti la lastajn avertajn plakojn „Mort-danĝero!” Kaj la germana registaro ĵus realigis la planon, fari el la iama mortiga zono naturprotektejon kun pli ol 120 000 hektaroj. Estiĝis la plej granda areo de koleraj biotopoj en Germanio.

Loĝantoj apud la naturprotektejo profitos ne nur ekologie sed ankaŭ ekonomie: la kombino de netuŝita naturo, kulturo kaj historio sendube allogos multajn turistojn kaj precipe naturamantojn, kiuj volas vidi kaj sperti tiun unikan biotopejon. Ĉu ne estas konsole, ke fojfoje – kiel montras tiu ĉi ekzemplo – el malbonaĵo povas estiĝi io bona?

Sincere via

Stefan MAUL



MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵo ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendo ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarif: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alós i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Matil Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Librecojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: medio@monato.net.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Modernaj komunikiloj, ĉu fideblaj?

Mi legis en MONATO 2006/5, p. 5, la konkondukon de Stefan Maul pri modernaj komunikiloj. Mi ne estas tiel entuziasma kiel li, almenaŭ pri la nuntempo. Fakte, la aferoj estas simplaj, sed nur kiam ĉio bone funkcias. Kiam io neatendita okazas, la aferoj subite komplikiĝas.

Ĉar tiuj teknologioj estas novaj, problemoj aperas de multaj flankoj: presiloj, virusoj, spamo, obstakloj vole enmetitaj de fabrikistoj por instigi al aĉetado de nova versio, nekompreneblaj helpiloj ... ofte mankas la cirkonstancoj, por ke ĉio iru glate, kaj la infero ekas ... Fakte, nur tiuj, kiujn ĉirkaŭas komunumo de uzantoj (entreprenejoj, studentoj, grandaj asocioj ...) povas elturniĝi, sed por izolitoj tio pli malfacilas ...

Estas ne nur teknikaj problemoj, sed ankaŭ homaj kaj sociaj: Posedi rimedojn por sendi rapide multajn mesaĝojn ne donas garantion, ke ĉe la alia fino homoj havas tempon kaj bonvolon por legi ilin, des pli ke la akceptado ofte daŭras pli longe ol la sendado, ĉefe por tiuj kiuj ne estas ekipitaj de rapida retkonekto. Ofte mi devas atendadi dek minutojn por ricevi (pli malpli) amuzan ŝercon en megabajta dosiero, kaj mi malbenas la sendinton, se mi ne tutsimple enrubujigas la mesaĝon.

Ofte, kiam asocio uzas retpoŝton por organizi kunvenon, la duono de la korespondantoj konfesas, kiam respondeculo finfine alvokas ilin telefone, ke ili ne havis tempon por legi la mesaĝon, ke ilia leterkesto estis plenŝtopita aŭ ke ĵus estis problemeto pri la komputilo ...

La novaj teknologioj hodiaŭ ne estas tutpretaj, kaj dezirindas, ke baldaŭ ili estu ...

Jean-Sébastien BRILLEAUD
Francio

Gurdado de onidiroj

La vidpunkto de Stefan Maul (MONATO 2006/4, p. 7) reagigas min. Li rediras la kutimajn onidirojn pri disvastigo de birdogripa viruso. Ĉie oni aŭdas kaj legas, ke la viruson kunportas la migrantaj birdoj, kaj ili infektas bredejjajn kortobirdojn.

Kompreneble, tio kelketajn fojojn okazas, sed nur malofte, ĉar malsanaj birdoj ne povas migri. Plie, ne estas facila afero por migrinta anaso eniri fermitan industrian kortobirdan bredejon, kaj ĝenerale ili preferas plaŭdi laĝetojn. Bredejo enhavanta milojn da koketoj povas multe pli facile infekti la najbarajn sovaĝajn birdojn per fluanta malpura akvo, sterko kaj koto.

En Japanio oni trovis en 2003 la viruson. La registaro malpermesis importon de bredejjaj birdoj, sed la sovaĝaj birdoj daŭrigis la migradon. En 2006 ne plu estas birdogripo en Japanio. Simile, sovaĝaj birdoj daŭre migras de sud-orienta Azio, kie komenciĝis la birdogripo, al Aŭstralio, kie birdogripo ankoraŭ ne aperis. La epizootio disvastiĝis ĉefe de Ĉinio al Eŭropo. Tio ne estas birda migrovojo, krom trajne aŭ aviadile por enkaĝigitaj birdoj.

Fine, se la sovaĝaj birdoj estus la ĉefa fonto de la epizootio, oni estus observinta ilian amasmorton kie ili svarmas; tio ne okazis.

Thierry TAILHADES
Francio

Tipe germana

Gratulon al Stefan Maul pro liaj artikoloj *Lingvaj problemoj* (MONATO 2006/6, p. 5) kaj *Germana batalo* (p. 7). Ŝajnas, ke la germana lingvo, kiu iam en la pasinteco ludis gravan rolon en

la sciencoj kaj artoj, iom post iom iĝas minacata. Jen sperto mia pri la radiostacio WDR, kiu elsendas en la plej granda germana federacia lando Nordrejn-Vestfalio, loĝata de 17 milionoj da homoj. De ses jaroj mi observas, ke WDR ofte prezentas en siaj novaĵelsendoj intervjuojn kun anglalingvanoj tiel, ke oni aŭdas komence la tuton en la angla kaj poste en la germana traduko. Male la parolojn de alilingvaj gravuloj oni aŭdas nur unufoje, ĉar la neanglalingvaj parolojn oni interpretas samtempe. Tio havas la strangan efikon – ekzemple dum la nuna milito de Usono kontraŭ Irako –, ke oni aŭdas dufoje la mensogojn de George Bush, sed nur unu fojon la vortojn de la neanglalingvaj kontraŭmilitemuloj. Mi skribis protestleteron al WDR, ties respondon mi ĝis hodiaŭ vane atendas. Kiam mi rakontis al konatoj miaj pri tio, ili montriĝis nekompreneblaj – ne pro la lingva diskriminacio, sed pro mia ĉagreno pri tio. Tia sinteno estas normala en la germana socio, kies anojn oni povas efike ofendi per la diraĵo „Vi estas tipe germana”.

Ludger SCHMÉINK
Germanio

Tipe germana (2)

Mi ŝatis la artikolon de Stefan Maul pri la malkresko de la germana lingvo (MONATO 2006/6, p. 7). Ĉar antaŭ 35 jaroj mi studis germanan beletron, mi kapablas konversacii en la germana lingvo pri ordinara temo. Sed plurfoje en Germanio okazis al mi la jena misaventuro: Mi parolis germane kun germano. Post kvaronhora konversacio li demandis min: „Vi estas alilandano, ĉu ne?” „Jes ja, mi estas francino.” Tuj li ekparolis al mi en la angla! Mi devis grumbli. Mi diris, ke mi estas francino, ne anglino. „Bonvolu daŭrigi en la germana!” Neniu germano, kun kiu mi parolis germane, proponis al mi transiri al la franca lingvo.

Ankaŭ en Hispanio oni proponis al mi paroli angle anstataŭ kastilie. Sed tio estas iom pli komprenebla, ĉar mia nivelo en la kastilia lingvo ne estas tre alta. Tiam mi nur ĝentile klarigis: „Mi ne parolas la anglan pli bone ol la kastilian.”

Jacqueline LÉPEIX
Francio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Lern-fazo

de Stefan MAUL

Kiu gvidas la mondon? Vi tuj respondas: kompreneble Usono, la sola grandpotenco post disfalo de Sovetio, la politike kaj ekonomie plej forta ŝtato, sen aŭ kontraŭ kiu nenio funkcias bone. Ĝi sola konstruis la militon kontraŭ Irako, aliaj landoj nur kontribuis per manpleno da soldatoj; Usono ne vere bezonis ilin por forpeli la despoton en Bagdado. Ĝi eĉ ne bezonis la subtenon de Unuiĝintaj Nacioj (UN).

Reputacio falis

Kiam la usona prezidento Bush [buŝ] komencis la militon, en multaj landoj oni admiris lian kuraĝon, en aliaj oni malaprobis ĝin kiel kontraŭleĝan aŭ eĉ kriman. Nun, tri jarojn poste, la usonaj soldatoj ankoraŭ ne kapablas fini la militon kaj la reputacio de Usono falis draste ne nur en tiuj landoj sed ankaŭ en multaj aliaj. Bush kaj lia registaro devis lerni, ke tamen Usono tute sola ne povas majstri ĉiujn krizojn kaj ke ĝi bezonas helpon de aliaj. Ankaŭ en Eŭropa Unio (EU) oni lernas. La Irak-milito disigis landojn de EU; Francio kaj Germanio kontraŭis la militon, aliaj helpis Usonon, sed pluraj el ili jam retiris siajn soldatojn. Nun EU provas reunuiĝi kaj reprovizigi al Usono, ĉar ĝi devis konstati, ke spite al ĉiuj klopodoj ĝi ne kapablis solvi iujn problemojn sen Usono – aktuale temas pri Irano kaj ĝia ambicio posedi atomarmilojn. Sed jen, ankaŭ Bush siavice lernis, ke li devas kunlabori kun EU kaj do finfine denove intertraktas kun Irano.

Dependas ĉiuj

Serĉante sian estontan rolon en la mondpolitiko, ankaŭ multaj aliaj lernas, ekzemple Rusio, kiu post fazo de deprimado rimarkas novan fortiĝon, uzante siajn energifontojn por devigi EU kaj Usonon al kunlaboro. Ĉiuj aliaj devas agnoski,

ke rapide prosperanta Ĉinio estas ne nur grandpotenco sed hegemonia ŝtato en Azio. Japanio devas adaptiĝi al la nova situacio. Simile Barato, kiu ankaŭ prosperas, akiris novan pozicion de forto kaj fariĝas plia grandpotenco. Irano provas akiri tiun rolon en sia regiono, Egiptio iom perdis sian gvidan rolon en la islama mondo. Kaj tiel plu. Ĉiuj troviĝas en lernofazo por destini la estontan strukturon de mondpolitiko, kiun karakterizas ne nur ekonomia tutmondiĝo. Ni ne povas preteratenti, ke ĉiuj landoj, ankaŭ la grandaj, iĝas ĉiam pli kaj pli interdependaj kaj ke neniu povas agadi izole.

Plej malfacile estas por EU, kiu ĝis nun ne trovis metodon por paroli ekstere kaj tutmonde per unu voĉo. Post fiasko de provo enkonduki konstitucion, preskaŭ ne eblas establi komunan eksteran politikon. Pro tio estiĝis agogrupoj ekster la kutimaj strukturoj, ekzemple rilate al Irano aŭ okcidenta Azio; en tiuj agogrupoj gravan rolon ludas Francio, Germanio kaj Britio. Jen oni kunagas kun Rusio, jen kun Usono aŭ kun ambaŭ. Kaj ĉiujn unuigas batalo kontraŭ terorismo.

Mankas vizioj

Kia do estos la mondpolitiko? Aldoniĝas la problemoj, ke tute mankas vizioj. Post kolapso de komunismo praktike malaperis politikaj ideologioj; ankaŭ komunismo en Ĉinio ne estas vera ideologio, nur ankoraŭ masko por ordinara kapitalismo. Bush havis la vizion, ke per milito li povos porti demokration kaj liberecon al Irako kaj sekve al la tuta islama mondo. Li funde eraris, ĉar okcidenta demokratio kaj islamo absolute ne kongruas. Sed ankaŭ

en islamo mankas vera vizio; fundamentalismo estas retropaŝado, ne progreso al pli bona estonteco.

Unu vizion tamen ni havas: la ĉarton de UN kun impetoj por libereco kaj homaj rajtoj por ĉiuj. Sed UN ankaŭ estas en malfacila fazo, nelaste pro malatento kaj kritikado fare de Usono. Fiaskis ĝis nun provoj reformi la organizaĵon tiel, ke ĝi povos majstri la defiojn de nuntempo kaj estonteco. Certe, Bush lernis intertempe, ke ankaŭ Usono bezonas la organizaĵon, kiun ĝi kunfondis, ekzemple en la Iran-konflikto. Sed Usono ankoraŭ ne tiom favoras ĝin kiel necesus. Ni do esperu, ke la nuna lernofazo ankaŭ tiurilate kondukos al bona rezulto. ■



STEFAN SCHULZE

Bush lernis, ke ankaŭ Usono bezonas Unuiĝintajn Naciojn.



La balotoj en Kongo kontribuu al finfina stabileco por la popolo

D. R. KONGO

Kiel eskapi la pasintecon?

La Demokratia Respubliko Kongo eliris el longa kaj peniga milito, kiu disŝiris la landon kaj dividis ĝin en pecoj administrataj de milicestroj. La popolo, kutimiĝinta al ĉiuspecaj krimoj kontraŭ homaj rajtoj, povas danki al la internacia komunumo, kiu helpas restarigi pacon kaj stabilecon.

Balotado kiu devis okazi fine de julio espereble kontribuis al la politika restrukturado de la lando. Tamen, por fine eskapi el la problemoj de la pasinteco, necesas unuigi la diversajn milicojn por krei unusolan ŝtatan armeon kaj, samtempe, aresti kaj senarmigi la eksmilitistojn ankoraŭ aktivajn en najbaraj landoj, ekzemple Ruando kaj Burundo, kiuj semas panikon en la vilaĝoj de Kongo.

Tiuj banditoj nepre rehejmiĝu kaj kontribuu al la rekonstruado de sia patrolando. Por tion realigi, denove necesas la interveno de la internacia komunumo, inkluzive de Unuiĝintaj Nacioj, Eŭropa Unio kaj Afrika Unio.

H. NTAWU Hubert

ALBANIO

Kverelo neniam entombigita

Lastatempe la greka registaro postulis, ke oni konstruu tri tombejoj por grekaj soldatoj mortintaj en la teritorio de Albanio dum la dua mondmilito. Neniam Albanio kontraŭis similajn tombejoj en sia teritorio, krom por naziaj soldatoj.

Tiel, delonge ekzistas tombejoj por francaj falintoj en la unua mondmilito kaj por britaj en la dua. Koncerne italajn kaj germanajn mortintojn la koncernaj registaroj reprenis ekde la 1950aj jaroj la ostojn de siaj viktimoj por ilin silande entombigi. Nur Grekio neniam reprenis la ostojn de siaj falintoj (tion tamen private ja faris familianoj).

Sed antaŭ nelonge la konsulo greka en Gjirokaster (sude de la lando), interkonsente kun la registaro, aranĝis kun grek-ortodoksa pastro de apuda vilaĝo, ke estu eltombigitaj la ostoj de supozitaj mortintaj grekaj soldatoj kaj reentombigitaj aliloke sed en la sama distrikto.

Protestoj

Sekvis protestoj pri tiu ĉi freŝa malbonintenco de la greka registaro, kiu daŭre konsideras la sudan parton de Albanio *Vorio Epiro*, t.e. norda Epiro, do greka teritorio. Kiam la pastro provis arigi la ostojn de la supozitaj grekaj

soldatoj en specialajn metalajn kestojn en sia preĝejo, protestis vilaĝanoj, dirante, ke ne temas ekskluzive pri la restaĵoj de grekoj sed ankaŭ de albanoj. Laŭ la protestantoj, la pastro kaj liaj kunlaborantoj eĉ pagis monon al relative malriĉaj vilaĝanoj, por ke tiuj silentu, kvankam temas pri tomboj de iliaj proksimuloj.

En la albana parlamento kelkaj deputitoj opiniis, ke la iniciato indikas alian aventuron politikan de por-grekaj ŝovinistoj, kiu neniel plibonigos rilatojn inter la du pratempaj popoloj de la duoninsulo.

Bardhyl SELIMI

Tolaro ne plu tolerata

En junio 2006 la Eŭropa Parlamento kaj la Eŭropa Komisiono decidis, ke Slovenio plenumas ĉiujn kriteriojn por transiri de la loka valuto, la slovena tolaro, al la komuna eŭropa valuto, eŭro. La decido baziĝis sur fakraportoj pri la ekonomia evoluo de Slovenio.

Slovenio estas la unua el la dek novaj EU-membroŝtatoj, kiu fariĝos (ekde la 1a de januaro 2007) membro de la komuna monmerkato kaj ekuzos eŭron. Tio indikas, ke la iama Jugoslavio, kies parto estis Slovenio ankoraŭ antaŭ 1991, havis pli stabilan kaj merkatate konkurenckapablan ekonomion, ol aliaj landoj de la iama socialisma bloko elirintaj el la sovetia ĉirkaŭbrako.

Memmastrumado

Jugoslavio havis de 1950 tre specifan kaj propre inventitan ekonomian sistemon, la t.n. memmastrumadon. En tiu sistemo oni kombinis la merkatan ekonomion kun iu apartaspeca socialismo, en kiu posedanto de laborrimedoj (fabrikoj kaj fabrikiloj, entreprenoj) estis nek unuopulo, nek la ŝtato, sed ĉiuj enpostenigitaj en la koncerna entrepreno.

Inter la entreprenoj funkciis normala merkata konkurenco. Tial pli evoluintaj partoj de Jugoslavio (Slovenio kaj Kroatio) leviĝis al alta ekonomia ŝtupo. La memmastrumado, kiun indus anal-

izi kaj esplori nun el historia distanco de 15 jaroj post ĝia nuligo, per sia specifa posedmaniero estis eksperimento, kies rezultoj estis tre pozitivaj.

Eble, ĝin studante, oni povus trovi alternativon al la nuna novliberalisma kapitalismo. En Jugoslavio funkciis ekonomia memmastrumado kombinita kun politika unupartieco. Kio estus okazinta, se ĝi estus kombinita kun politika multpartieco?

Zlatko TIŠLJAR



Subskribo stabiliga

En junio estis subskribita Stabila Interkonsento inter Albanio kaj Eŭropa Unio (EU) – granda evento por malgranda lando trairinta jam 15-jaran postkomunisman periodon.

Albanoj pretis subskribi antaŭ multaj jaroj, tuj post Hungario kaj aliaj pli evoluintaj landoj de centra Eŭropo, sed politikaj okazaĵoj en 1997 prokrastis ĝis nun la subskribon.

En la 500-paĝa interkonsento estas notite, ke Albanio devas daŭrigi siajn ekonomiajn kaj politikajn reformojn koncerne i.a. redonon de proprietajoj al iamaj mastroj, rajtojn de etnaj malplimultoj kaj liberon de gazetaro kaj regado. La registaro kaj aliaj instancoj daŭrigu same sukcese la batalon kontraŭ korupto kaj krimado.

Totalisma reĝimo

En sia danksaluto la ĉefministro albana Sali Berisha [beriŝa] diris, ke per tiu ĉi interkonsento oni agnoskas la gravajn paŝojn faritajn en Albanio. Tiel la lando eliris el la plej severa totalisma komunisma reĝimo en Eŭropo, kiu inkluzivis altruditan oficialan ateismon, troan kolektivigon kaj frakason de libera iniciato, kaj aliris al firmigita politika plurismo, libero de religia kredo, toleremo kaj privatigo de la ekonomio, kiu certigas pli ol 80 % de la malneta enlanda produkto.

La interkonsento estas realigita en momento, kiam ankoraŭ en EU-landoj plurestas la memoro pri malagrablaj okazaĵoj en Albanio post 1990, kaj kiam samtempe kreskas laceco en Eŭropo pri ties plivastigo. Tamen Alb-



Sali Berisha: „EU agnoskas gravajn paŝojn de Albanio.”

anio tiamaniere estos pli sekura, paca kaj stabila lando.

Bardhyl SELIMI

TOGOLANDO

Mur-muroj

„Moviĝu iomete, por ke mi trovu lokon por mia kajero por kopii la lecionojn,” diris unu lernanto al alia. Ankaŭ tiu ĉi diris tion al tria persono, la tria al kvara, ktp, ĝis fine la mesaĝo atingas la lernanton apud la muro. Venas la peto: „Muro, movu vin antaŭen, por ke mi trovu lokon por mia kajero por kopii la lecionojn.”



En togolandaj klasĉambroj ĉiuj kunpuŝiĝas pro manko de spaco.

Tia estas la situacio en togolandaj klasĉambroj. Ĝenerale, en ŝtataj lernejoj la studantoj sidas duope en klasĉambroj kun pli ol 50 gelernantoj. Kaj la nombro kreskas. Fofoje estas en klasĉambro 100 gelernantoj, tiel ke oni sidas tri- aŭ kvarope, kaj neniam estas spaco por teni kajeron kaj labori.

Bruo

Mankas rimedoj por konstrui kromajn klasĉambrojn. Ĉiu lernejestro klopodas siamaniere regi la situacion. Eblus fariĝi aliajn benkojn kaj tablojn,

se estus mono. Eĉ tiam oni sidus ĝis dekope. Tamen ĉiaokaze la lernantoj interpuŝiĝas, tiel ke ĉiam bruas la klasĉambroj kaj malfacilas lerni.

La klasĉambroj fariĝas varmegaj, tiel ke ĉiu volas eliri, ĉu por simple resti ekstere, ĉu por iri al vendisto kaj aĉeti akvon. Kiam intervenas la vokto por reirigi lernejanon en la klasĉambrojn, aŭdiĝas la reago: „La varmo ne respektas nin. Ni bezonas pli da spaco, por ke ĉiu libere kopiu siajn lecionojn. Super ĉio, ni bezonas dilateblajn murojn.”

BEGLO Koffi

ALBANIO

Aver-aĝe ...

Albanio sin distingas ankoraŭ inter la ceteraj landoj de Eŭropo pro relative alta naskokvanto. Tamen kontraste al antaŭaj jardekoj ĝia loĝantaro ankaŭ maljuniĝas. Laŭ donitaĵoj, la meza aĝo nun estas 31,2 jaroj, kompare kun malpli ol 27 jaroj en 1960. Tiam averaĝe ĉiu virino naskis kvin infanojn vivaj, nun nur 1,8.

Pro elmigrado post 1990 (pli ol triono de la iama loĝantaro jam loĝas eksterlande) kaj la nasko-falo oni konstatas maljuniĝon de la popolo. La averaĝa vivolongo plialtiĝis dum la periodo 1958-2001 de 52,6 jaroj al 72,1 por viroj kaj de 54,4 jaroj al 78,6 jaroj por virinoj. Oni konjektas, ke la albana loĝantaro atingos 3,7 milionojn en la jaro 2021, kiam la naskokvanto estos averaĝe nur 1,4 por ĉiu virino.

Bardhyl SELIMI

Medicina turismo

Pli kaj pli venas eksterlandanoj kuracocele al Litovio. Aparte furoras ĉe privataj klinikoj dentaj kaj plastiaj operacioj: en Litovio la kosto estas ĝenerale nur triono de tiu en Usono, Skandinavio aŭ Britio, de kie venas plejparte la pacientoj.

Fofoje operaciotoj komuniĝas retpoŝte kun kliniko, sendante ekzemple panoramajn radiografaĵojn kaj aliajn medicinajn informojn al la kirurgo kaj tiam interkonsentante pri la dato de la operacio. Pro favoraj flugeblecoj al Litovio la kuracisto atendas, ke plu kreskos tiu ĉi medicina turismo.

LAST/pg



Grava lingvo estas tiu, en kiu oni trovas multajn informojn

La 7an de julio aperis la 50 000a artikolo en *Vikipedio*, la ĉiutage kreskanta esperantlingva enciklopedio, ne pri Esperanto, sed pri ĉiuj facetoj de la homa kono. Ĝi troveblas interrete ĉe la adreso eo.wikipedia.org. Okaze de la apero de tiu „festa artikolo” MONATO parolis kun kelkaj motoroj de *Vikipedio*, nome kun Chuck Smith [ĉak smif], la iniciatinto de la projekto, kun Arno Lagrange [lagraj], la „burokrato” de *Vikipedio*, kaj kun Miroslav Malovec, unu el la multaj tre aktivaj kunlaborantoj.

MONATO: S-ro Smith, vi estas la iniciatinto de la esperantlingva *Vikipedio*, kiu ekestis apud multaj aliaj lingvo-versioj. Ĉu vi bezonis multe da persvadkapablo por aldonigi plian lingvon?

Chuck Smith: Tute ne. Kiam mi alvenis al *Vikipedio*, ĝi ja jam posedis Esperanto-version, sed tute sen artikoloj. Do, mi kontaktis Stefanon Kalb, kiu tiam havis sian *Enciklopedion Kalblandan*, kiu tiutempe estis la plej granda reta Esperanto-enciklopedio kun 150 artikoloj. Li konsentis enmeti siajn artikolojn en *Vikipedion*, kaj tio donis al ni bonan bazon por komenci verki veran enciklopedion.

MONATO: Oni do komencis nur per unu-du kunlaborantoj. Ĉu vi havas ideon, kiom da personoj nun kunlaboras?

Chuck Smith: Kunlaboris entute certe pluraj centoj. Sed iuj ja helpas nur per korekto de unu erareto hazarde vidita, kaj aliaj konstante kunlaboradas. En voĉdonado antaŭnelonga pri la majuskligo de familiaj nomoj partoprenis iom pli ol 20 personoj. Eble tio donas ideon pri la „veraj vikipediistoj”, do pri tiuj, kiuj dediĉas multan liberan tempon al la disvolvado de la enciklopedio.

MONATO: Ĉu la fakto, ke povas kunlabori multaj personoj, ne enhavas riskon pri manko de kohereco?

Chuck Smith: Ekzistas stilaj reguloj en *Vikipedio*, sed ili fojfoje ne estas sekvataj. Se oni trovas problemon kiel ekzemple „Franca/franca” aŭ „Francio/Francujo”, oni povas proponi stilan regulon kaj poste, se la komunumo konsentas, oni povas provi ŝanĝi ĉiujn artikolojn laŭ la nova stilo.

La paĝo pri MONATO en Vikipedio, kiu ricevis de la uzantoj la meritan epiteton „Elstara artikolo”.



MONATO: S-ro Lagrange, vi estas la „burokrato” de *Vikipedio*, do la administranto. Kion praktike tio signifas?

Arno Lagrange: Jes, mi ĉi-momente estas la sola „burokrato” en la esperanta *Vikipedio*. Tio signifas, ke mi havas, krom ordinarajn administrajn rajtojn, kelkajn specialajn rajtojn, nome precipe doni la administrajn rajtojn al aliaj uzuloj. Administrantoj (ni nun havas dekon) estas uzuloj, kiuj havas kelkajn specialajn rajtojn en la projekto. Ili povas forigi paĝojn (se ili estas neregulkonvenaj, malplenaj aŭ mistitolitaj), ili povas forbari fuŝulojn (sekve malhelpi ilin fuŝredakti), protekti difinitajn paĝojn, tiel ke nur iuj personoj povas redakti ilin, kaj redakti la interfacon, la „sistemajn mesaĝojn”, kiuj informas uzulojn pri la funkciado de la projekto.

MONATO: Se mi ĝuste komprenas, redakti tekston povas do ĉiu ajn?

Arno Lagrange: Redakti *Vikipedion* ▶



Chuck Smith



Arno Lagrange



Miroslav Malovec

► povas ĉiu, kiu povas aliri Interreton. Ĝentila kontribuanto kreas por si konton, ensalutas kaj tiam ties kontribuajfo aperas kun ties subskribo. Kontribuajfo de neensalutintoj (anonimuloj) aperas subskribitaj de la IP-adreso, per kiu la kontribuinto aliris la reton. Tiu tre malferma sistemo facile ebligas kontribudadon de multaj, sed ĝi ankaŭ estas malferma pordo por fuŝuloj. Eĉ se malicaĵ redaktaj estas relative maloftaj, tamen la komunumo devas priatenti ilin kaj protekti la projekton. Tial ni havas administrantojn kun specialaj rajtoj. Uzuloo, kiu tion petas, ricevas administrajn rajtojn post dusemajna kandidatiĝo kaj post aprobo de la aliaj kontribuantoj. Ĉiujn tiujn rajtojn administrantoj kaj burokratoj devas uzi, respektante la regulojn interkonsentitajn en la komunumo. Do ne temas pri arbitraj senlimaj povoj, sed precipe pri devoj por priatenti la bonan disvolviĝon de la projekto.

MONATO: Kiam vi parolas pri „la komunumo”, ĉu vi aludas la Esperanto-komunumon?

Arno Lagrange: Ne, ni kompreneble tie ĉi emfazas la esperantlingvan *Vikipedion*, sed ĝi estas nur unu branĉo de multlingva projekto, kundisolvata de same multlingva multnombra komunumo. Nun estas pluraj dekmiloj da kontribuantoj el ĉiuj landoj kaj lingvoj: necesas do starigi regulojn. Ĝenerale ili aperas, kiam post diskutoj oni atingis interkonsenton. Ni fieras pri niaj 50 000 artikoloj, pri nia aktiva komunumo kun dekoj da tre aktivaj redaktantoj kaj centoj da okazaj, sed la tuta projekto

entenas pli ol milionon da artikoloj, kaj branĉoj en iuj lingvoj enhavas plurajn centmilojn da artikoloj, kiujn pluverkadas miloj da kontribuantoj. Ni do konsciu, ke unuflanke *Vikipedio* estas granda ŝanco por Esperanto, ĉar ĝi estas unu el la plej grandaj atingajfoj iam ajn realigitaj en la lingvo, sed ke aliflanke nia esperanta branĉo aspektas tute malgranda apud branĉoj en deko da „grandaj lingvoj” (la angla, germana, japana, franca, pola ktp).

MONATO: Kaj la estonteco?

Arno Lagrange: Mi opinias, ke la esperantistaro devos laboregi por progresigi la esperantan *Vikipedion* ne nur kvante, sed ankaŭ kvalite, por ke ni povu montri al ĉiuj interesiĝantoj, ke eblas trovi bonajn enciklopediajn artikolojn pri ĉiuj temoj en Esperanto kaj ke sekve iam eblos al gestudentoj el ĉiuj mondpartoj studi per Esperanto ian ajn fakon. Jen celo, kiun la Esperanto-komunumo devus strebi atingi. Kaj jen kial mi fariĝis „burokrato” en tiu projekto.

MONATO: S-ro Malovec, vi estas unu el la plej oftaj kunlaborantoj de *Vikipedio*. Ĉu vi havas iujn preferatajn temojn, pri kiuj vi ofte verkas?

Miroslav Malovec: Jes, nun mi kontribuas pri ĉefaj verkistoj. Plej multajn artikolojn mi enmetis el *Enciklopedio de Esperanto* 1935, pri kio petis min Chuck Smith.

MONATO: Vi ankaŭ korektas kontribuojn de aliaj. Ĉu vi legas ĉiujn artikolojn?

Miroslav Malovec: Mi ne legas ĉiujn. Nur hazarde mi elektas en la rubriko *Lastaj ŝanĝoj* tiujn, kiuj min iel interesas (ekzemple Twain, Leonardo, Colodi ktp), kaj se mi vidas, ke mankas io interesa, kion mi scias, ke mankas la informon. Krome mi koncentriĝas je tri temoj: kompletigadi informojn pri la Esperanto-movado post 1935; informi pri ĉefaj eminentuloj, pri kiuj oni vane serĉus informojn en alilingvaj enciklopedioj, kaj informi pri ĉefaj urboj kaj iliaj vidindaĵoj, por ke Esperanto estu la plej riĉa turisma inform-fonto pri Ĉeĥio (sed ĉi-rilate meritas laŭdon ĉefe Petr Tomašovský).

MONATO: Iuj diras, ke *Vikipedio* estas kvazaŭ narkotaĵo. Se oni iam komencis verki por ĝi, oni estas tentata ĉiam plulabori. Ĉu tiel estas ankaŭ ĉe vi?

Miroslav Malovec: Nur parte. Mi estas redaktoro de *Starto*, la organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kaj mi sisteme enkomputiligas librojn kaj manuskriptojn por la estonteco. Dum kelkaj monatoj mi enmetadis bestokaj planto-nomojn al la reta biologia libraro (*BioLib*) – do tiuj taskoj deturnas min de *Vikipedio*, al kiu mi nun ne kontribuas tiom, kiom antaŭe. Sed mi estas certa, ke la ĉefa tasko de internacia lingvo estas liveri informojn pri ĉiuj imageblaj temoj kaj ke *Vikipedio* estas la plej grava projekto, kiun Esperantujo faras, kvankam esperantistoj tion ne konscias. Grava lingvo estas tiu, en kiu retanoj trovas informojn, ne al kiu oni aplaŭdas en Bruselo.

Paul PEERAERTS

Monarĥo-mistero: ĉu murdo aŭ sinmortigo?



Turistoj en Germanio ofte volas vojaĝi laŭlonge de la Romantika Strato kaj vidi la fabelo-kastelon *Neuschwanstein* [nojŝvanŝtajn], esperante „novcignoŝtono” (ŝtono en la senco de roko, monto), kiun konstruigis dum la 1870aj jaroj Ludoviko 2a, reĝo de Bavario. La reĝo tiam reprezentis jam mortantan sistemon, arkaikan feŭdismon sursojle de imperiisma germana grandregno. Dum tiu ĉi epoko pli kaj pli ŝrumpis la memkonscio kaj vivhorizontoj de la reĝo, kiu fine proksimiĝis al memdetruo.

Lia korta registaro instigis profesoron Bernhard von Gudden kaj pliajn kuracistojn deklari la reĝon nekuraĉeble mense malsana, tamen sen medicina ekzamenado kaj nur surbaze de onidiroj kaj nepruvitaj asertoj. La 9an de junio 1886 la registaro senigis lin de memstareco kaj metis lin sub kuratorcon. La 10an de junio lia onklo Luitpold transprenis la registaran respondecon kiel princredanto.

Ludoviko volis alvoki al la popolo bavara: Princo Luitpold intencas kontraŭ mia volo leviĝi kaj fariĝi reganto de mia lando, kaj malveroj pri mia sanstato trompis mian amatan popolon kaj preparas perfidajn ribelajn agojn. Mi apelacias al ĉiu fidela bavaro aliĝi al miaj lojalaj anoj kaj malebligi la planon perfidi reĝon kaj patrimon (fonto: *Gazeto de Bamberg* la 11an de junio – nelonge poste la gazeto estis konfiskita). Bismarck, la tutgermana kanceliero, konsilis la reĝon tuj sin prezenti antaŭ la popolo, sed Ludoviko ne sekvis la konsilon. Malgraŭ helppropozoj la reĝo restis pasiva.



Kastelo Neuschwanstein en Bavario: konstruigis ĝin Ludoviko 2a dum pli ol 10 jaroj. Supre: La bavara reĝo Ludoviko 2a: daŭre restas duboj pri lia morto en 1886.

Arestita

Ludoviko estis arestita ĉe kastelo Neuschwanstein kaj poste veturigita al kastelo Berg apud Starnberg-lago. Tie li mortis vespere de la 13a de junio 1886 en malprofunda akvo proksime

de la bordo, kvankam li kapablis bonege naĝi. Kun li mortis lia kuracisto, profesoro von Gudden.

Laŭ oficiala deklaro, la kuracisto volis malebligi la reĝan memmortigon kaj dume iel mem trovis morton. Sed ►



Gugluloj, membroj de mistera sekto kun originoj en mezepoko, starigis krucon en la Starnberg-lagon tie, kie ili kredas, ke estas mortpafita la reĝo.

► tiu versio baldaŭ estis pridubata. Ĝis hodiaŭ aŭdiĝas nebulaj teorioj pri la morto de la reĝo, ekzemple, ke la reĝo volis fuĝi kaj estis mortpafita.

La patologiĝan ekzamenon de la reĝa korpo partoprenis la persona kuracisto de la reĝo, d-ro Schleiβ [ŝlajs] kiu ne estis konvinkita pri malsano de la reĝo. Post dissekcado la mortinto estis tuj enbalzamigita: la tombo de Ludoviko 2a troviĝas en malgranda preĝejo en Munkeno, sed lia koro estas forportita en urno al pilgrimejo Altötting [alteting].

Sekreta societo

Ĝis hodiaŭ ekzistas sekreta societo de *Guglmänner*, esperante gugluloj, kiuj en nigraj kapuĉoroboj – simile al tiuj de usonaj ku-kluks-klananoj – daŭre memoras kaj adoras la iaman

reĝon. Verŝajne ili sopiras pri la reveno de monarkio. La gugluloj certas, ke la reĝo estis murdita. Okaze de la 120a datreveno de lia morto tri kapuĉuloj remis tien en la Starnberg-lago, kie laŭ ilia konvinko la reĝo perdis sian vivon.

Tiel ili malkaŝis „gravan” detalon. Ili kredas, ke la oficiala kruco malekzakte montras la lokon de la reĝa morto, kaj do tial ili starigis luman krucon 47 metrojn pli sude, kie ili kredas la veran mort-lokon. Krome ili certas, ke du kugloj trafis ilian amatan reĝon en la dorson, senditaj de „perfida pruso”, almenaŭ de murdisto laŭ ordono de la prusa sekreta servo.

Gugluloj estas konataj jam de la mezeŭropa pestepoko inter 1347 kaj 1353 kiel misteraj simboloj de morto kaj, samtempe, admono de vivantoj. Kavaliroj, vestitaj kiel monaĥoj, marŝis antaŭ la ĉerkoj de mortintaj bavaraj monarkoj. Ili kovris la kapon kaj vizaĝon per kapuĉo, en malnova bavara dialekto nomita *gugl*, kaj ili portis en la manoj du krucitajn peĉtorĉojn – timiga spektaklo memoriganta pri la maldaŭro de la surtera vivo laŭ la devizo *media in vita in morte sumus*: meze en vivo en morto ni estas.

Kavaliro-kapuĉo

Gugluloj agas sekrete kaj kaŝe. Ne eblas aliĝi: oni devas esti elektita, kaj nur post longdaŭra hierarkia kariero oni povas atingi la trian rangon, tiun de kavaliro. Nur tiam oni ricevas la kapuĉon. Nek la nombro de membroj, nek statuto, nek nomoj, nek lokoj de kunvenoj estas publike konataj.

Laŭ la gugluloj, oni transportis la kadavron de la reĝo al sekreta loko kaj la ĉerko intertempe estas malplena. Fakte la reĝaj posteuloj malpermesas (re)aperigon de la ĉerko. Kial?

La gugluloj de Ludoviko 2a donis al si la taskon malkaŝi la cirkonstancojn de lia morto. Ili asertas, ke la reĝo estis nek memmortiganto nek murdisto, kaj ili ne volas toleri, ke „ilia” ŝatata reĝo suferu tiajn reputaciaĉon kaj malhonoron. Legante pri tiaj eventoj mi timas, ke ni ankoraŭ ne tute superis la mezepokon.

Jomo IPFELKOFER

DONACKUPONO

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

NOVAĴO

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **11,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **23 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **46 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponojn nun ĉe MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be

Monato
INTERNATA MAGAZINO SENDEPENDA

Peza problemo

La litova servo pri sanprotektado informis, ke miloj da policistoj, limgardistoj, fajrobrigadanoj kaj militistoj de internaj taĉmentoj estas tro grasaj.

Preskaŭ duono de la oficistoj superpezas; kontraste, inter la samaĝa cetera loĝantaro de Litovio, nur iom pli ol du kvinonoj estas tro dikaj. Precipe grasaj kaj superpezaj estas policanoj: preskaŭ kvinono de la policanoj suferas pro diversaj sanproblemoj, inkluzive de malbonaj sangocirkulado kaj vidado.

Pasintjare pensiigis 508 oficistoj, inter kiuj 489 ankoraŭ ne atingis sian pensian aĝon parte pro malsano. Ŝajnas, ke nur tri kvaronoj el la oficistoj kontrolas sian sanstaton.



Litovaj policanoj: iliaj pezaj paŝoj kontribuas al malsanoj kaj al frua emeritiĝo.

LAST

SUPERSTIĈOJ

Ĝemeloj kaj goriloj

Misteraj estuloj kun teruraj kapabloj: multaj homoj en Kongo-Brazavilo tiel konsideras ĝemelojn. Oni kredas, ke ĝemeloj envenas la mondon kun mistikaj fortoj kaj tial ili estu aparte bone traktataj kaj respektataj de familianoj kaj aliaj. Ĝemeloj povas ekzemple malsanigi, malriĉigi kaj alimaniere suferigi.

Kelkaj homoj opinias, ke ĝemeloj devenas de la akvo; kaj la fakto, ke ili pli-malpli samtempe naskiĝas, kaj foje samaspektas, kredigas, ke ili estas iel unu estaĵo, kiu kapablas ekspluati misterajn fortojn por trompi simplajn homojn.

Se iam akcidentas la gepatroj, aŭ estas enplektitaj en komplika afero, pri ĉio ĉi kulpas supozeble la ĝemeloj. Rezulte, multaj homoj ne volas naski

ĝemelojn – ne nur pro la kromaj elspezoj sed ankaŭ pro la mistiko, kiu asociiĝas kun ĝemeloj.

Sporto

Alia sfero, en kiu rolas superstiĉoj, estas sporto. Ĉi tie, kiel ankaŭ pli ĝenerale en la socio kaj la ekonomio, ludas fetiĉoj gravan rolon. Multaj sportistoj vizitas fetiĉistojn por havigi al si apartajn fortojn. Ili do ricevas talismanon, entranĉon en la haŭton, aŭ sorĉon por fariĝi nevenkeblaj.

Fojfoje ludonto ekdancas, kvazaŭ hipnote, antaŭ la kontraŭuloj. Tion li faras ne intence sed pro ia stranga forto, kiu puŝas lin preskaŭ ĝis frenezeco. Ofte tiel kuraĝiĝas lin trumpetoj kaj aliaj instrumentoj, ĝis la dancanto teren fa-

las. Dum tiu ĉi spektaklo, ĝuinda sed ankaŭ ridinda, videblas la fetiĉisto, kiu gardas la sorĉon en fetiĉujo kaj ĝin de tempo al tempo reaktivigas.

Apenaŭ kompreneblas la rilato inter ekzemple futbalo kaj fetiĉismo. Pro tio, ke du interludontaj teamoj vizitas siajn fetiĉistojn, komenciĝas la ludo jam antaŭ la matĉo mem. Sed ĉe la futbalejo tiuj, kiuj estas pleje elmetataj al la influo de la fetiĉistoj, estas la guloj. Laŭdire aperas antaŭ ili fojfoje pitono aŭ gorilo kaj, por eviti la minacon, ili flankenkuras kaj tiel enlasas golon.

Aliflanke, ĉe internacia nivelo, afrikaj sportistoj bone konscias, ke regas ne superstiĉoj kaj fetiĉoj, sed scienco kaj tekniko.

Jean-Louis MADZELLA/pg

ĈINIO

Protektu kaj riparu



Argumentebias, ke rapida modernigo detruas tradiciajn kulturojn kaj rapidigas ilian pereon. Protekti tradiciajn kulturojn kaj akceli ekspluaton de kulturaj riĉfontoj fariĝis gravaj rimedoj por konservi kulturan diversecon kaj garantii daŭrigeblan disvolvon de la homaro en ekonomia tutmondiĝo.

En Pekino estas komerca kvartalo Dazhalan, kiu situas sud-okcidente de Tiananmen-placo. De la dinastio Yuan (1271-1368) ĝis la Respubliko de Ĉinio (1912-1949), ĝi estis unu el komercaj kaj amuzaj centroj de Pekino. Tiu ĉi komerca kvartalo sin karakterizis pro centoj da konataj malnovaj firmaoj, ekzemple la ĉinmedicina apoteko *Tongrentang*, la butikoj de legompeklaĵoj *Liubiju*, la ŝu-butikoj *Neiliansheng* kaj la silkovendejoj *Ruifuyang*.

Surbaze de primitiva interna spirito de la tradiciaj kulturoj oni renovigas la tieajn kulturajn heredaĵojn kaj fondas modernajn elementojn en ilin. Ekzemple, en Dazhalan estas strateto Lang-

fang-1, en kiu troviĝas blanka kvaretaĝa domo, konstruita en la jaro 1905. Ĝi funkcias kiel la unua magazeno en Pekino, kaj nun ĝi servas kiel hotelo.

Problemoj

En la kvartalo kun areo de ĉirkaŭ unu kvadrata kilometro troveblas 50 000 loĝantoj kaj rekonstruado komenciĝis decembre de 2004. Sed aperis unu post la alia problemoj foje malfacile solveblaj.

Porrestaŭri la antikvajn konstruaĵojn necesis transloĝigi la loĝantojn. Kaj, post la rekonstruado, la kvartalo povos enteni malpli da homoj ol antaŭe: rezulte pli ol duonon de la tuta investo kompanse ricevis 20 000 homoj, kiuj por ĉiam forlasos la kvartalon. Paren-teze, por la investantoj granda profito simple venas de konstruo de domegoj post malkonstruo de malnovaj domoj.

Kortoj

Por efike protekti kvadratajn kortajn domojn de tradicia arkitekturo, la mag-

istrato formulis la ĉefan principon de rekonstruado tiel: protekto kaj riparo. La Instituto de Arkitekturo kaj Urbo de la Universitato Tsinghua, kiu respondecas pri la rekonstruado, nepre konservi la trajtojn de la antikva ĉefurbo, inkluzive de la kvadrataj kortaj domoj, kun originala ebeneco kaj vasteco.

Konstruota estas komerca trafiklinio, dum ĉirkaŭ la kvartalo estos malpermesataj altaj konstruaĵoj. Originalaj loĝdomoj plejparte konserviĝos, sed oni ŝanĝos ilian internan funkcion. Estontece la kvartalo Dazhalan servos al kulturo, turismo kaj komerco.

Pekino estas kaj historia kultura urbo kaj moderna metropolo. Multaj novaj konstruaĵoj reprezentas la funkciojn de moderna ĉefurbo, dum multaj bone konservataj kortaj domoj, stratoj kaj aliaj tradiciaj areoj spegulas kulturajn trajtojn. Rapide evoluante, Pekino tamen konservas sian tradician kulturon.

WEN Zhihong

UZBEKIO

Perlo ĉe la Silka Vojo

Samarkando! Eĉ mencio de tiu nomo elvokas misteron, fabelon, eĉ magion. Oni nomis la urbon „Romo de Oriento”, „Edeno de l' antikva Oriento”, „Perlo de l' islama mondo” ... Samarkando travivis multajn dramecajn eventojn en sia 2750-jara historio. En la antikveco kaj mezepoko ĝin trapasis ne nur karavanoj, veturantaj laŭ la Silka Vojo, sed ankaŭ legioj de Aleksandro la Granda, trupoj de arabaj militestroj, hordoj de Ĉingis-Ĥano ... Situante en Centra Azio, en la pitoreska valo de Zarafŝan, tiu legendeca urbo vere posedas magnetan forton.

Apartan gloron Samarkando akiris dum la regado de elstara ŝtata aganto Amir Temur (1336-1405), kiu igis ĝin ĉefurbo de sia grandega imperio en Azio, etendiĝanta de la rivero Induso ĝis la markolo Bosporo. Laŭ Temur Samarkando devus superi per sia belo kaj riĉo ĉiujn ĉefurbojn de la mondo. Ĉi tie loĝis kaj kreis multaj eminentaj sciencistoj, poetoj kaj metiistoj de Oriento. La urbo famas tra la tuta mondo pro siaj belegaj arkitekturaj monumentoj kaj ne hazarde estas registrita en la listo de mondaj kulturheredaĵoj de Unesko.

Afrosiab

Afrosiab estas la loko norde de la urbo, kie situis antikva Samarkando. Ĉi tie oni povas vidi grandegan aron da senvivaj montetoj, kiuj kaŝas multajn enigmojn. Antaŭe ĉi tie bolis vivo, prosperis komerco, metioj kaj artoj.

Tiutempe oni uzis kiel tradician konstrumaterialon miksitajn kaj densigitajn argilon kaj nebakitajn brikojn, kiuj estas uzataj en la regiono ankaŭ nun, ĉar argilo bone ŝirmas la domojn kontraŭ ►

*Neĝa leopardo,
simbolo kaj blazono de Samarkando.*





Maŭzoleo Gur-Emir.



La placo Registan, antikva forumo de Samarkando.

► sufoka varmego somermeze kaj samtempe ebligas konservi varmon dum frostaj vintroj.

Aparte vidindas pentroarto de la 6a-7a jarcentoj, malkovrita en la palaco de reganto de Samarkando, kiu estas dekorita per skulptaĵoj, ĉizita alabastro kaj pentraĵoj. Sur unu el la konserviĝintaj fragmentoj oni povas vidi la riĉan karavanon, ĉekape de kiu marŝas blanka elefanto, ornamita per dorsotuko kaj portanta sur sia dorso principon. Ŝi estas akompanata de servistino. Postsekvas rajdistinoj sur diverskoloraj ĉevaloj, viroj sur unuĝibaj kameloj, maljunulo kaj ĉevalrajdanto. Samloke videblas ĉevalaro kaj cignosimilaj birdoj.

Uzante limigitan nombron de koloroj, ĉefe ruĝan, blankan, bluan kaj brunan, pentristoj de Afrosiab kreis pentraĵojn, sur kiuj la historia realaĵo intime interplektiĝas kun fikcio. Pri la alta nivelo de kulturevoluo en Afrosiab atestas ankaŭ alia interesa eltrovaĵo – unika ŝaka kompleto (kun ĉiuj ŝakfiguroj!) el eburo, kiun fakuloj konsideras unu el la plej antikvaj tutmonde.

La maŭzoleo Gur-Emir

Gur-Emir estas la tombo, en kiu estas enterigita Amir Temur, liaj filoj kaj nepoj. La blua kupolo de la maŭzoleo altas je 12,5 metroj kaj nombras 64 randojn. La diametro de la kupolo ampleksas 15 metrojn. Oni komparas ĝin kun tulipo, kuniginta siajn petalojn. „Se la ĉielo malaperos, la kupolo de Gur-Emir anstataŭos ĝin”, oni diris pri la maŭzoleo. Turkis-kolora glazuro faras ĝin ege bela vidaĵo precipe surfone de la helblua ĉielo de Samarkando.

La tombojn, inter kiuj konturiĝas bela nefrita tomboŝtono de Temur, ĉirkaŭas aĵura marmora krado. Ĉi tie oni enterigis ankaŭ la filojn de Temur – Ŝahruh kaj Miranŝah –, lian nepon Ulugbek, spiritan mentoron Mir Sejid Bereke kaj aliajn. Sub la ĉefa halo estas kripto kun la tomboj, estigitaj dum la tempoj de Ŝahruh kaj Ulugbek. En la halo de la maŭzoleo ĉiuj tomboj estas kopiitaj je sarkofagoj el marmoro.

En la 20a jarcento Gur-Emir estis plurfoje restaŭrita, ĉefe lige kun la

celebrado de la 660-jara jubileo de Amir Temur, okazinta en 1996 sub la aŭspicioj de Unesko.

La moskeo Bibi-Ĥanim videblas el la norda minareto de la medreseo de Ulugbek.





STEVE EVANS

La placo Registan

Antikva forumo de Samarkando, modelo de urboplanado en mezepoka Oriento, estas la placo Registan. Dum la tempo de Temur ĉi tie troviĝis centra bazono, al kiu gvidis ses ĉefaj stratoj. Poste dum la regado de Ulugbek la

placo akiris solen-oficialan funkcion. Sur ĝi okazis militistaj paradoj, oni anoncis ukazojn, plenumis publikajn ekzekutojn. En la 15a kaj 16a jarcentoj sur la placo estis konstruitaj karavan-seraĵoj, moskeoj, medreseoj (islamaj lernejoj).

En la jaroj 1417-1420 nepo de Temur, Ulugbek, reganto kaj sciencisto, fondis universitaton, kiu estas konata kiel la medreseo de Ulugbek. Ĉi tie oni instruis ne nur teologion, sed ankaŭ matematikon, astronomion, filozofion, retorikon. Tiutempe Samarkando akiris famon de unu el la plej elstaraj centroj de scienco kaj kulturo.

La medreseo de Ulugbek frontas la placon je majesta portalo kun ogivo. Ĉe la anguloj staras minaretoj pli ol 30 metrojn altaj. Mozaika panelo super la enireja arko estas dekorita per stiligitaj ornamaĵoj geometriaj. Malantaŭ la portalo situas kvadratforma interna korto (30 m x 30 m), kiu inkluzivas moskeon, lernoĉambrojn kaj kelojn, en kiuj loĝis studentoj. La medreseo estis unu el la plej bonaj ekleziaj universitatoj de islama Oriento en la 15a jarcento. Ulugbek mem lekciis en ĝi kaj gvidis disputojn kun studentoj kaj sciencistoj.

Vidalvide al la medreseo de Ulugbek, spegule ripetante ĝian ĉefan fasadon, altiĝas la medreseo Ŝer-Dor (1619-1636), konstruita sur la placo laŭ ordono de Jalanguŝ Bahodur Bij. Arkitekto de la medreseo estis Abul Ĝabbar, kaj pentristo estis Muhammad Abbas. Ege belas la ornamo de la plata portala arko kun nigrahara radianta suno homvizaĝa kaj tigro-aspekta leono, postkuranta blankan damaon. Tiu ĉi dekorado fakte donis la nomon al la medreseo Ŝer-Dor (havanta leonojn).

Dek jarojn poste, kvazaŭ por kunigi la du medreseojn, Jalanguŝ Bahodur Bij ordonis konstrui inter ili mirigan laŭ ties luksa dekorado medreseon Tilla-Kari (1646-1660). Tiel ekestis unika arkitektura ensemblo Registan. Krom ĝia ĉefa destino – loko por edukado de studentoj –, Tilla-Kari rolis ankaŭ kiel moskeo. Ĝi havas duetaĝan fasadon, vastan korton kun kvar galerioj kaj studentaj loĝĉambroj. En la okcidenta parto de la korto situas la moskeo, kies ĉefa halo estas riĉe orumita. De ĝi devenas la nomo de la medreseo „Tilla-Kari” (kovrita per oro). La ensemblo de tri medreseoj estas unika ekzemplo de la urba konstruado kaj arkitektura planado de ĉefa urba placo. Vespere ĉi tie multas turistoj kaj urbanoj, kiuj venas ĉi tien ĝui la mirindan vidaĵon kaj rigardi originalan lumsonan spektaklon *La koro de Samarkando*. En ĝi sonas nacia muziko, la placo estas varie lumigata per diverskoloraj lumjetiloj. Registan kvazaŭ reviviĝas kaj la monumentoj mem plenvoĉe „rakontas” pri si kaj pri la longa kaj drameca historio de Samarkando.

Bibi-Ĥanim: la moskeo de Temur

Vendreda moskeo de Temur estis unu el ĉefaj arkitekturaj objektoj en la urboj. Tiutempe en la arkitekturo de Centra Azio formiĝis monumenta parad-stilo. Pri tio ĉi klare atestas la surskribo sur portalo de Ak-Saraj, palaco de Temur en urbo Ŝahrisabz: „Se vi dubas pri nia majesteco, rigardu niajn konstruaĵojn”. ▶





La antikva strato Ŝahi-Zinda.

La arkitektura ensemblo Ŝahi-Zinda

Post la mongola invado en la 13a jarcento kaj detruo de Samarkando la urbo movis sin malsupren. Ĝuste tiam sur la suda deklivo de Afrosiab aperis la ĉeno de maŭzoleoj, kiuj formas la nekropolan ensemblon Ŝahi-Zinda, unikan en la islama Oriento. La ensemblo formiĝis dum preskaŭ naŭ jarcentoj, kaj nuntempe ĝi inkluzivas pli ol 20 diverstempajn konstruaĵojn. La unuaj datiĝas de la 11a-12a jarcentoj, tamen el ili konserviĝis nur la fundamentoj (fragmentoj de muroj kaj kriptoj).

La arkitektura ensemblo ekestis sur la loko de adorejo, kie laŭlegende estas enterigita Kusam ibn Abbas, kunaganto kaj kuzo de profeto Mahometo. Kusam estis unu el la unuaj misiistoj de islamo en Centra Azio. La nomo „Ŝahi-Zinda” (viva caro) estas ligita kun la popola legendo pri paganaj triboj, atakintaj la regimenton de Kusam dum la preĝo, kiu laŭ preskriboj de islamo neniam devas esti interrompata. Oni mortigis ĉiujn kaj senkapigis Kusam, tamen laŭ legendo li prenis sian kapon en siajn manojn kaj descendis en puton, kiu neatendite aperis antaŭ li. Onidire li plu vivas en paradizo. La ŝtupforma ceramika tomboŝtono de Kusam ibn Abbas havas kvar tavolojn, kovritajn per reliefaj majolikaj kaheloj kun tre riĉa plant-ornamo. Sur la randoj de la tomboŝtono videblas orumitaj skribaĵoj el Korano kaj kurtaj instruaj sentencoj pri la agoj kaj eldiroj de profeto Mahometo (hadisoj). Super la pordo de la maŭzoleo oni skribis: „Pordego al paradizo estas malfermita al ĉiuj homoj”.

Ŝahi-Zinda fakte estas kreaĵo de la arkitektura skolo de Samarkando kaj Centra Azio dum ties formiĝo kaj evoluo.

La maŭzoleo de Hoĝa Danijar

La maŭzoleo de Hoĝa Danijar estas unu el la plej gravaj kultlokoj en Samarkando. Gravas, ke ĝi estas egale respektata de islamanoj, kristanoj kaj hebreoj. Danijar, Daniil, Daniel estas la nomoj de tiu sanktulo. La saĝeco de Danielo estas traktata kiel dia donaco pro pieco.

Onidire liaj restaĵoj estis alportitaj kun granda honoro al Samarkando laŭ

ordono de Amir Temur, por ke la urbo iĝu grava religia centro. Kiam la karavano el 50 kameloj alproksimiĝis al la urbo, neatendite ili ĉiuj haltis ĉe la bordo de la rivero Sijob. Oni prenis tion kiel bonan signon kaj tie enterigis la restaĵojn de la sanktulo. Post la enterigo sur la sama loko ekŝprucis akvofonto. La samarkandanoj uzas ĝian akvon ĝis nun, kredante je ties saniga forto. Interne de la maŭzoleo videblas 18-metra tombo de Hoĝa Danijar, pri kies longeco cirkulas diversaj legendoj ...

La observatorio de Ulugbek

Mirzo Ulugbek (vera nomo Muhammad Taragaj, 1394-1449) famiĝis ne nur kiel la kreinto de astronomia skolo en Samarkando, sed ankaŭ kiel la fondinto de la observatorio, en kiu laboris talentaj astronomoj Kazi-Zade Rumi, Gijasuddin Ĝemŝid, Ali Kuŝĉi kaj aliaj. En 1428-1429 oni konstruis la majestatan observatorion, en kiu Ulugbek sukcesis instali tiutempe la plej modernajn instrumentojn. Kiel skribis Zahiriddin Babur, „sur la altaĵo Kuhak Mirzo Ulugbek konstruigis altegan konstruaĵon de la observatorio por kompilado de la astronomiaj tabeloj”. Laŭ Babur ĝi estis trietaĝa cilindroforma konstruaĵo, kovrita per belegaj kaheloj. Ĝia diametro ampleksis 46 metrojn, ĝi altis ne malpli ol 30 metrojn kaj enhavis grandiozan instrumenton – marmoran sekstanton, per kiu oni observis sunon, lunon kaj planedojn.

Elstara atingo de samarkandaj astronomoj sub la gvido de Ulugbek estis la de ili kompilita stela katalogo *Ziĝi Guragani* (1437), kiu estas konata kiel *Stelaj tabeloj de Ulugbek*. Ulugbek mem skribis: „Ĉio, kion observoj kaj sperto eksciis pri la movado de la planedoj, estas transdonita por konservo al tiu ĉi libro”. En la verko oni resumis la bazon de astronomiaj esploroj, faritaj de la orientaj sciencistoj dum multaj jarcentoj. Ties ĉefa valoro konsistas en tio, ke en la verko estas determinitaj la koordinatoj de 1018 steloj. Ulugbek ankaŭ malkovris proksimume 200 antaŭe nekonatajn stelojn. Dum kelkaj jarcentoj la tabeloj estis nesuperblaj laŭ precizeco.

Anatoli IONESOV

Bavario funebras pro Beppo Bruno

En suda Germanio post 20a de majo 2006 dum pluraj semajnoj unuopa kaj unika „monstro“ kaŭzis maltrankvilon: urso. Ĝi ne sciis, ke post la mortpafo de la lasta urso en 1835, neniu urso rajtas vivi libere en tiu „libera ŝtato“ Bavario. Veninte el norda Italio ĝi vagadis en la monta regiono inter Tirolo/Aŭstrio kaj Bavario/Germanio, migrante multajn kilometrojn zigzage en arbaroj kaj alta montaro. Laŭ sia naturo la vagulo mortigis kelkajn kaprojn kaj ŝafojn penetrante sur paŝtejojn, formanĝis kuniklojn romp-malferminte iliajn stabletojn kaj detruis abelujon por frandi mielon.

Pli ol 130 jarojn tiaj bestoj estis kvazaŭ malaperintaj el tiu regiono. La ekzamenado de haroj kaj spuroj identigis la urson: JJ1 – virseksa. Li estis nomita laŭ la gepatroj: patrino Jurka kaj patro Joze venis el Slovenio. Oni translokigis ilin en la naturparkon Adamello-Brenta, kie en 2002 naskiĝis du viraj ursetoj. JJ2 malaperis. En septembro 2005 perdiĝis liaj spuroj. JJ1 similas al la patrino, kiu kondukis lin al homaj vilaĝoj, kiam li estis ankoraŭ ursobebo, instruis lin enpenetri en stabletojn kaj paŝtejojn kaj buĉi manĝeblan bruton. Tiel li perdis sian naturan timon kaj distancemon.

Schengen kaj Maastricht

Nervoze kaj sensperte reagis popolo kaj politikistoj. Kion fari? En Bavario oni decidis, ke la urso estas danĝero publika kaj oni permesis al ĉasistoj mortpafi ĝin. Naturprotektantoj kaj bestamantoj kontraŭis; ili proponis kapti ĝin en speciala kaptilo. Sed la urso ne emis esti kaptita kaj ne alproksimiĝis. Ĉiam denove ĝi buĉis ŝafojn kaj kuniklojn, formigradis kaj transiris sen ĝeno la landlimon konforme al la konvencioj de Schengen kaj Maastricht kaj la traktato de Amsterdam. En Aŭstrio ĝi ricevis azilon:



Tie la respondecaj instancoj malpermesis la ursĉasadon. Veterinaroj kaj specialistoj kun spertoj en kaptado de sovaĝaj bestoj per blovtuboj kaj nar-kotigaj sagoj embuskis – vane.

De tempo al tempo la urso mallonge montriĝis al kamparanoj kaj turistoj, fojfoje iu sukcesis kapti foton. Sed ĉiam li tuj forzigzagis kaj neniu ĉashundo sukcesis sufiĉe longe sekvi

ĝian spuron. Eĉ la speciale trejnitaj ursohundoj, importitaj el Finnlando post kelktagaj burokrataj intertraktoj, perdis la ursan odoron disflugantan en la somera varmego.

Nokta karambolo

La popolo pli gastame, kvazaŭ familece akceptis la urson kaj tuj transbaptis ĝin. Tiel la urso ricevis du ►



Ursoĉasistoj kun kvin speciale trejnitaj hundoj venis speciale el Finnlando.

► novajn nomojn: Beppo kaj Bruno – supezeble laŭ lia koloro.

La 14an de junio nokte ĝi karambolis kun aŭtomobilo. Sed nek la aŭtomobilisto nek la urso spertis gravan damaĝon. Ne troviĝis sangospuroj ĉe la aŭtomobilo. Ŝajnas, ke la besto nur pasante tuŝetis la retrospegulon.

La 16an de junio la urso estis vidita proksime al la sud-bavara urbo Bad Tölz [telc]. La finnlandaj ursoĉasistoj kun siaj kvin speciale trejnitaj hundoj rekomencis la serĉadon laŭlonge de la rivero Isar. La polico vaste baris la regionon multe vizitatan de montarmiguloj. Sed Bruno ĝuis plue sian liberecon. Merkrede ĝi akompanis

aŭtomobilon. Jaŭde ĝi montriĝis sur teraso de skikabano kaj foriris nur malrapide, kiam la dommastrino bojjs kiel hundo. Vendrede unu el la finnaj specialhundoj haltigis la urson, sed dum alrapidis la ceteraj hundoj kaj ĉasistoj, Bruno adiaŭis kaj malaperis denove.

La regiona registaro ediktis, ke neniu rajtas restadi en proksimo de mil metroj ĉirkaŭ la ĉaskaptistoj. Malobeante la dekreton oni riskus monpupon de 5000 eŭroj.

Vetoficejoj demandis, kiu el ambaŭ restos pli longe: la urso en libereco aŭ la germana futbalteamo en la mondĉampionad-turniro. Kaj gazeto organizis voĉdonadon pri la nomo de



T-ĉemizoj montras la datojn kaj lokojn de la urso migrado, simpatias kun la urso ruzeco aŭ apelacias trovi ĝin.

urso, ĉu Beppo aŭ Bruno. Intertempe oni trovis ĉasludon en Interreto (www.brunoderbaer.de), kaj oni povis aĉeti T-ĉemizojn, kiuj montras la datojn kaj lokojn de la urso migrado, simpatias kun la urso ruzeco aŭ apelacias trovi ĝin (www.baerbruno.de).

Iam unu el la finnaj serĉhundoj perdiĝis en la montaro, sed bonkondukte sin reanoncis ĉe arbohakisto, kiu rekondukis al la posedanto la hundon, elĉerpitan de la somera varmo. La ĉasistoj timis la porursan simpation de la popolo. Tial bavaraj barbaroj postulis, ke policistoj mortpafu la urson.

Bruno ripozu en paco

Lunde la 26an de junio 2006 kelkajn minutojn antaŭ la kvina horo ĉasistoj mortpafis ĝin. Politikistoj defendis la ĉasagon, publiko funebras, kelkaj eĉ minacas la ĉasiston, kies identeco ne estas publikigita. „La urso mortis, la murdistoj vivas”, iu diris. Kaj „Bruno estas morta – R.I.P.” (latine: *Requiescat in pace* – ĝi ripozu en paco). Opozicia partio postulas abdikon de la pormedia ministro en Bavario kaj unio de bestoprotektantoj asertas, ke la mortigo lezas internaciajn traktatojn kaj regulojn.

La ĉasista asocio bedaŭris la mortpafon kaj defende diris, ke necesis ĉasi la urson pro ĝiaj nenormala konduto kaj danĝeraj kutimoj.

Nun la kadavro estos genetike ekzamenata kaj poste preparata por esti montrata en la muzeo *Mensch und Natur* (homo kaj naturo) en Munkeno, kie troviĝas ankaŭ la lasta sovaĝa urso el Bavario, ĉasmortigita antaŭ 130 jaroj.

Endanĝerigita specio

Restas nur malmultaj ursoj en Eŭropo: En Slovakio oni taksas 300 ĝis 600, en Hispanio iom pli ol 100, en Italio 60 ĝis 70. En Francio vivas nur malmultaj en la pirenea montarregiono. En 2004 la lasta „purrasa” franca ursino estis mortpafita eksterleĝe. En la lastaj semajnoj estis kaptitaj tri ursoj en Slovenio kaj metitaj en liberecon en la franca parto de pireneoj. Artistoj transprenis patronadojn por tiuj bestoj, sed ŝafistoj elmetis venenitan mielon.

JOMO IPFELKOFER

Jubile, jubilade, gargantuece palatkareseme

Mi sentas min eksterordinare feliĉa. Kaj tamen ... la edzino grumblas daŭre kiel kutime, la infanoj faradas ĝuste la kontraŭon de tio, kion mi deziras, eĉ la kato ne ĉasas la kolombojn, kiuj malpurigas mian trotuaron. Kaj tamen, io en mi jubilas, io en mi festas. Festi sola ne estas agrable, tial mi invitas vin festi kun mi, ĉar mi malkovris la fonton de mia ĝojo, la fonton de mia feliĉo, la fonton de mia deliro.

Mi loĝas en lando, en kiu la nuna frusomera sezono povas nur feliĉigi, nur kontentigi. Estas lando kun neimageble granda nombro da restoracioj, kiel iu slovaka vizitantino prave rimarkigis. Estas lando, kie la popolo dediĉas multe da atento al manĝado; oni serioze traktas ĝin, oni konsideras ĝin eksterordinare grava afero; ĉiam estas senfina festado kaj manĝado, kiun oni dum tagoj priparolas, antaŭe kaj poste. Kaj precipe la fino de majo kaj komenco de junio estas la plej feliĉiga tempo de la jaro. Estas minimume kvar kialoj, kiuj daŭre radiigas vizaĝojn.

Unue: tiam aperas kaj estas haveblaj la (holandaj) virgaj haringoj! Temas pri la nova, tiel nomata „verda” malgranda haringo, peklita surmare, kiun oni en sia tuto glitigas tra la gorĝo. Mmmmm! Mmmmm! Nenio en la mondo estas pli bongusta ol tia virga haringo! En la iama katolika tempo oni ĉi tie al la infanoj rakontis, ke en la ĉielo oni povas daŭre manĝi, per oraj kuleretoj, rizkaĉon ... sed ni ĉiuj estis konvinkitaj, ke tute ne temis pri rizkaĉo, sed pri la holandaj virgaj haringoj!

Molaj kaj dolĉaj

La virga haringo, parenteze, havas grasecon de pli ol 16 %. Ĝi dankas



La virga haringo dankas sian specialan guston precipe al la fiŝa pankreato.

sian specialan guston precipe al la fiŝa pankreato. La fiŝetoj ankoraŭ ne havas evoluintajn seksorganojn. Ili estas kapteblaj nur dum ses semajnoj, inter mezo de majo kaj fino de junio. Tiam ili jam abunde manĝis planktonon. Post kaptado oni senigas ilin de intestoj, sed lasas la grasan stomakon, peklas ilin kaj lasas ilin maturiĝi dum dudek kvar horoj. Tiel ili fariĝas veraj molaj, dolĉaj, kremecaj virgaj haringoj.

Due: poste aperas la novaj junaj (nematuraj, almenaŭ ne tute maturaj jam) terpomoj el Murzeko (vilaĝo je kelkaj kilometroj de mia domo). Ili estas malgrandaj, almenaŭ la unuaj, kaj oni ne senŝeligas ilin, sed per tranĉilo zorge kaj atente forskrapas la haŭton. En la komenco oni eĉ ne bezonas

tranĉilon, iom da frotado per mano sufiĉas por forigi la haŭton. Poste oni kuiras ilin, fajne tranĉas kaj bakas en multe da bona butero. Eble tio estas ankoraŭ pli bona ol la virga haringo. Cetere oni povas tutsimple ambaŭ kune manĝi!

Estas vere, ke plej ofte oni akiras diareon pro manĝado de tiaj terpomoj, sed ĉiu flandro tre volonte suferas iom da diareo post la manĝo de junaj novaj terpomoj. Strange, sed tiuj terpomoj de malgranda vilaĝo havas apartan guston. Eĉ tiuj de apudaj vilaĝoj ne estas same bongustaj.

Trie: preskaŭ samtempe estas haveblaj la novaj fragoj. En nia lando, Flandrio, estas multaj regionoj, kie oni kreskigas fragojn. Ekde kiam ili estas ►

Abonhelpa Fonduso

En 2004 la legantoj de MONATO donacis 48 senpagajn abonojn al Esperanto-parolantoj en Albanio, Barato, Ĉado, Ĉinio, Irano, Kostariko, Kubo, Malio, Rumanio Ruslando, Vjetnamio kaj en aliaj landoj. Sed restas ankoraŭ multe pli kiuj deziras legi revuon en Esperanto sed ne havas la financon kapablon por pagi ĝin. Vi helpu al ili ricevi MONATOn senpage kaj donacu sumon al la „Abonhelpa Fonduso”.



Sendu kiun ajn sumon al FEL aŭ al via kutima peranto, kun la mencio „Abonhelpa Fonduso de MONATO”.

Se vi deziras, vi povas ankaŭ ekscii, kiu ricevis la abonon kiun vi donacis kaj eble ekkorespondi kun „via” leganto. Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevantoj kaj ricevantoj koran dankon!



Veraj molaj, dolĉaj, kremecaj virgaj haringoj pretaj karesi la palaton ...

► haveblaj, mi ĉiutage veturas al apuda regiono, kie oni apud la fragokampo vendas la rikolton, kaj ĉiun duan tagon mi aĉetas tutan kilogramon. En tiu periodo ni manĝas ilin matene kun la buterpano, tagmeze post la tagmanĝo, plej ofte en kefiro, kaj denove vespere kun la vespermanĝo, plej ofte denove kun buterpano. Ekzistas nun sendube dudeko da diversaj specoj, kaj ĉiu havas sian apartan guston. Sed preskaŭ ĉiuj ravas min.

Digna al dioj

Kvare, sed tion mi ne tiom ofte aktive partoprenas, iom poste sekvas la asparagoj. Ankaŭ tre proksime de ni estas regiono de bredado de asparagoj. Ankaŭ ili estas vera manĝo digna al dioj. Tiujn ni tamen ne ofte hejme preparas, sed ni iras al restoracio por manĝi ilin en taŭga medio. Tiu legomo ja bezonas sian reĝan etoson, devas esti manĝata kun respekto, kun ĝentileco, en plena honoro. Se ĉiujn aliajn aferojn mi kuraĝas manĝi simple vestita, ĉe simpla tablo, kamaradece, mi ne kuraĝus tion fari al Asparago. Jes, la majusklo estas intencal!

Kaj nun oni trovis manieron ankoraŭ suprenlevi nian feliĉon. Se antaŭ deko da jaroj mituloj estis haveblaj nur en la

monatoj, kiuj enhavas la literon „r” en sia nomo, nun oni trovis manieron por servi (post rikolto) mitulojn jam ekde la mezo de julio. Sekvontan semajnfino ili jam estas anoncitaj. Ankaŭ ili konsistigas nepre iun nacian manĝon ĉe ni. Kiu deziras manĝi la plej bonajn, la plej dikajn, la plej bongustajn, tiu veturas (kun ankaŭ miloj da flandroj ... kion mi diras? dekmiloj da flandroj) al malgranda vilaĝo en Nederlando, tamen je nur kelkdeko da kilometroj de mia pordo.

Mi ne povas daŭrigi skribadon pri tio, aŭ mi ploros emocie. Oni servas la mitulojn en kolosaj kvantoj, en grandaj kaseroloj, en ilia ŝelo, orflavaj, dikaj kiel voluptaj virinaj buŝoj, en vaporanta saŭc-akvo kun sekretaj spicoj kaj legomoj. Oni manĝu prefere kun farmista bruna pano, bone buterumita per freŝa farmista natura butero. Kiu iam manĝis tion nepre ne plu povos pluvivi sen regula porcio. Kelkfoje, sed tio estas malpli sankta, oni manĝas ilin ankaŭ kun frititaj terpomoj. Tamen, ankaŭ ĉiu flandra virino havas propran sekretan recepton, por prepari ilin hejme (1 kg po!).

Kaj mi ankoraŭ nenion rakontis pri cikorio aŭ angiloj. Nu, eble iam!

Petro DESMET'

Maria Magdalena: ĉu edzino aŭ ne?

Jen la fontoj el kiuj la aŭtoro Dan Brown venigas la pruvon, ke Jesuo estis la edzo de Maria Magdalena. La temo de la romano (laŭ la aŭtoro mem) estas esence, ke Jesuo edziĝis kaj naskis filinon, de kiu devenas la franca merovida dinastio kaj ĉiuj „falsaĵoj kaj altrudoj” de la kristana eklezio kun la Priorejo de Ciono kaj *Opus Dei*. Jen kiel estas konstruataj la pruvoj.

La unua pruvo de la aŭtoro venas de la apokrifa *Evangelio laŭ Filipo* (tiel nomata kun ioma kaprico, ĉar en la papirusoj malkovritaj en la egipta urbeto Nag Hammādi la teksto prezentiĝas senaŭtore), verko certe enkadrebla en la gnostika literaturo de la fino de la dua jarcento post Kristo. Temas pri la anonima *logio 55b* (*logio* estas teksta diraĵo), kiu diras: „la kunulino (*koinonos*) estas Maria Magdalena. La Sinjoro ŝin amis pli ol la aliajn disĉiplojn kaj ofte ŝin kisadis sur ...”. La tripunkton oni ne juĝu silento pro pudoro aŭ pro neceso kaŝi ion misteran: ili simple indikas, ke estas truo en la papiruso mem. La truo Dan Brown plenigas per „... sur la buŝo”, kio do estas aldoni aŭ interpreto, kiel oni nomu ĝin. Aldonaĵo, tamen, tute oportuna, ĉar tia sama estas ankaŭ la komuna fakula interpreto. Jen do la „pruvo”, ke Jesuo kaj Magdalena estis geedzoj!

Sed Dan Brown preferas ignori, kiel unuanime tion komentas la fakuloj: „Kisi sur la buŝo” estas tipa esprimo de la gnostika literaturo, kiu per tia metaforo intencas atentigi pri la transdono de esotera saĝo, kiu certigu la perfek-



Magdala, naskiĝloko de Maria Magdalena

tan inicado al la sekreta doktrino. Neniu fakulo, el iu ajn vidpunkto, taksas tiun esprimon io rilata al amindumado aŭ seksuma aŭ erotika. La vorton „kunulino” (*koinonos*, plurfoje uzata en la sama apokrifaĵo kaj en aliaj), la samaj fakuloj interpretas kiel „fidelulon, kiu profunde komprenas kaj fidele sekvas”. Ĉu neniu rimarkigis tion al Dan Brown?

La dua pruvo venas de la apokrifa *Evangelio laŭ Tomaso*, malkovrita en 1945 kun la antaŭe menciita teksto en la gnostika biblioteko de Nag

Hammādi¹. Jen la teksto, kiel citita en la libro *The da Vinci Code*: „Simono Petro diris al ili (la disĉiploj): Maria foriĝu el inter ni, ĉar la virinoj ne indas je la Vivo!” (*logio 112*, alitraduke 114). Tio do estu la pruvo pri la edza stato de Jesuo, ĉar (ĉu ĵaluza?) Petro proklamus ĉi tie malkaŝe la am-rilaton inter Jesuo kaj Magdalena!

Sed la romanisto, kiu asertas, ke li ĉerpis el historiaj dokumentoj, forĝas prezenti al la leganto la sekvon de la sama teksto. Ĝin ni citu komplete: „Simono Petro diris al ili: Maria foriĝu el ▶

Prisilentita heroo

Kiam mi unue ekvidis ĉi tiun libron, mi pensis: „sendube teda biografio pri iu homo apenaŭ konata.” Kiomege mi eraris!

La aŭtoro havas tre klaran kaj plaĉan stilon. Li scias prezenti sian temon tiel, ke la leganto neniam konfuziĝas. Kvankam ĉefe biografio de la ĉeĥo Přemysl Pitter, ĝi estas ankaŭ tre instruplena enciklopedieto pri la eventoj en la iama Ĉeĥoslovakio, dum ĉi ties eventoplena, kaj larmige mallonga, ekzisto nur iomete pli ol 70-jara, el kiuj nur dum 1919-1938 kaj 1945-1948 ĝi estis vere libera; de 1938 ĝin regis la nazioj, kaj nur tri jarojn post ĝia liberiĝo en 1945, ĝin eksuperregis Sovetio.


Přemysl Pitter estis junulo apenaŭ dekokjara, kiam li fariĝis soldato en la aŭstra armeo, kaj spertis la teruron de la Unua Mondmilito. Li dizertis, ricevis pro tio mortokondamnon (kiun, feliĉe, oni ne sukcesis plenumi), kaj dum la tuta cetero de sia vivo li estis fervora pacifisto. Li estis ankaŭ fervora kristano, kvankam ĉeĥspeca kristano. Ni memoru, ke jam antaŭ la epoko de Lutero, la ĉeĥa regiono estis la naskiĝloko de la estonta Reformacio. Pitter konsideris sin pli-malpli evangelia kristano, kio supozeble estis la ĉeĥa termino por „Protestanto”, laŭ la filozofio de la ĉeĥaj antaŭreformaciaj Reformistoj. Sed eĉ pli, li estis aktiva humanisto, kiu komprenis la esencon de la religio helpi la kunhomojn, kaj kiu, tiurilate, ne distingis inter „simpatiantoj” kaj „malamikoj”.

Dum sia militservo, li votis, fidele kaj plene, dediĉi sin al plibonigo de la vivkondiĉoj de siaj kunhomoj, se Dio lasos lin vivi, kaj ne morti dum tiu milito. Pro siaj naturaj talentoj kaj la oportunoj utiligeblaj, li komprenis tion, unue, kiel la taskon eduki la senhavajn klasojn de la socio, tiel ke ili, kaj precipe iliaj infanoj, havu eblon dece vivi. Sed post la ekregado de la nazioj, li ekkonsciis, ke multe pli tuja urĝo estas savi la judajn infanojn. Li per nelacige-

bla laborado en 1933 sukcesis akiri domon, poste ankaŭ kelkajn malnovajn kastelojn, en kiuj judaj infanoj povis trovi rifuĝon, esti inde nutrataj kaj prizorgataj, kaj, gravege, edukataj. Ja dum la nazia epoko judaj infanoj ne rajtis edukiĝi en lernejoj!

Post la liberiĝo, la malvenko de la nazioj, ne plu estus bezona lia speciala savlaborado, ĉu ne? Nu, tamen estis. Ĉar en Ĉeĥoslovakio loĝis multaj germanoj, kaj nun iliaj infanoj spertis la saman socian malakcepton, kian spertis la judaj infanoj dum la nazia periodo. Krome, la nombro de orfoj kaj judaj kaj germanaj en Ĉeĥoslovakio (kaj ankaŭ Germanio kc.) estis giganta. Do ankaŭ germanaj infanoj trovis rifuĝon en la protektejo-edukejo de Přemysl Pitter. En tiu protektejo-edukejo la infanoj, kaj judaj kaj germanaj, intermiksiĝis, interamikiĝis, kaj trovis kaj la emocian kaj la korpan subtenon, kiun ili bezonis por plu vivi.

Kompreneble, ĉion ĉi ne efektivigis Přemysl Pitter sola. Jam dekomence, li serĉis kunhelpantojn: individuajn kaj grupajn. La Ruĝa Kruco en diversaj landoj, kvakeraj servogrupoj diversloka, kaj aliaj donacis necesajn monon kaj provizaĵojn. Plurcent infanoj ŝuldas sian vivon al la laboroj de Pitter kaj liaj helpantoj. Ĉefa inter la helpantoj estis lia „vivkunulino”, Olga Fierz, kiu egale energie kaj sindone dediĉis sin al la projekto de Pitter. Ŝajnas, ke volonte ŝi estus iĝinta edzino de Přemysl; sed en sia iama voto, li inkluzivis plenan



ĉastecon kaj deklaron, ke por plene dediĉi sin al Dio, li neniam edziĝos.

Multo estas pritraktita en ĉi tiu libro, aparte de Přemysl Pitter. Pitter estis admiranto, preskaŭ adoranto, de la unua prezidento de Ĉeĥoslovakio, Tomáš Masaryk, ankaŭ fervora kristano. Tio, tamen, ne signifas ke li ĉiam akordis kun Masaryk. Masaryk, malgraŭ sia profunda pio kaj religia konscienco, ekkonsciis pri la malpraktikeco de multaj el la instruoj de Jesuo. En la reala mondo militoj ja okazas, malamikeco ja okazas, la juro ne povas funkcii plene surbaze de la jesuaj instruoj. Masaryk devis konfronti tiun fakton, kaj fari multajn kompromisojn. Kvankam Pitter komprenis la dilemon de Masaryk, li ne povis aprobi la kompromisojn. Feliĉe, en la infanrifuĝejo plejparte tiaj dilemoj ►

Islanda historia romano

Sagao de Njal apartenas al la t.n. *Islandanaj Sagaoj*, verkitaĵoj de nekonataj aŭtoroj en la 13-a jarcento. La sagaoj estas prozaj rakontoj pri eventoj okazantaj ekde la fino de la 9-a jarcento ĝis la komenco de la 11-a. Tiuj eventoj havas historian bazon, sed la aŭtoroj pritraktis la temon artisme, tiel ke oni povas rigardi la sagaojn kiel historiajn romanojn, tamen realismajn.

Sagao de Njal estas la plej granda kaj artisma el la sagaoj. Malgraŭ vasta personaro kaj komplika eventaro ĝi formas arte kunplektitan tutajon; oni havas la impreson, ke ĝia aŭtoro havis enmense ĝian lastan vorton jam en la komenca ĉapitro. Konfliktoj, venĝoj, repaciĝoj viciĝas en drameca sinsekvo ĝis la definitiva solviĝo en la fino.

Personecoj atestas pri si mem per vortoj kaj faroj, neniam estas dirite, kion ili pensas.

La sagao estas tradukita jam en multajn lingvojn. Laŭ internacia enketo inter eminentaj verkistoj lastjare *Sagao de Njal* estis elektita kiel unu el la cent plej bonaj verkoj de la monda fikcia literaturo.



Paĝoj: 357; ilustrita; 21 cm; kudre bndita; 2003;

Prezo: € 18,00


Informoj:

tel. +32 3 234 34 00;

tel. +32 3 233 54 33;

rete: butiko@fel.esperanto.be

<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

► ne okazis. Kvankam Pitter estis la spirita ĉefo de la entrepreno, Olga estis praktikema kaj tre kompetenta administranto – fakto, kiun ne plene aprezis multaj antaŭ ol Pitter estis ekzilita de la komunista ĉeĥoslovaka registaro kaj lia entrepreno devis daŭri sen li. (Tamen, nelonge; ĉar post nemultaj monatoj, la komunista registaro devigis la transdonon de la tuta entrepreno al komunistaj regado kaj principoj.)

Pitter multe laboris en aliaj landoj post sia ekziliĝo, sed maljunaĝe li, kun Olga, ekloĝis en vilaĝo svisa Afoltern am Albis. Precize dum la samaj jaroj, kiam mi mem loĝis en tiu vilaĝo! Kvankam mi neniam renkontis Pitteron aŭ Olgan (nu, almenaŭ ne sciante, kiuj ili estas), mi ofte aŭdis kaj legis en la ĵurnaloj pri tiu maljunulo, kiun honoris per doktoreco la Universitato de Zuriko, kaj kiu ricevis specialan inviton al Israelo. En Israelo li renkontis plurajn el siaj iamaj zorgatoj; kaj proksime al Jad Vašem li plantis arbon – speciala honoro, donita al li; kaj krome ankaŭ Olga ricevis kaj akceptis tiun honoron. Legante ĉi tiun libron, mi subite komprenis, pri kiu temis multaj eventoj tiamaĵ.

La biografiinto, kaj mi mem, ne tre facile simpatias kun la religia sinteno de Přemysl Pitter. Sed ke, por li, religio signifis praktikan elkoran helpon al ĉiu homo, bezonanta helpon, mildigas kelkajn eblajn kritikojn pri Pitter.

Kvankam ĉefe biografio, ĉi tiu libro ankaŭ detale klarigas sociajn, politikajn kaj mondajn eventojn de la priemata periodo. Tiel la leganto mem edukiĝas pri multo, kion li antaŭe ne sciis aŭ nur parte sciis. Ĉu Přemysl Pitter efektive estis preskaŭsanktulo, kia opinias lin Karel Kraft, mi iomete dubas. Sed vere li estis tre grava persono, preskaŭ nekonata kaj nehonorita en sia propra lando, sed por ĉiam memorenda.

Donald BROADRIBB

Karel Kraft: *Heroo de amo: la vivo de Přemysl Pitter*. Eld. Kava-Pech, Dobřichovice, 2005. 194 paĝoj fortike gluitaj. ISBN 80-85853-81-7.

Prezo ĉe FEL: 19,80 eŭroj + afranko.

MONATO • aŭgusto-septembro 2006

Andreo Cseh: legendo jam dum sia vivo

Komence de 1920 la katolikan subpastron de Sibiu vizitis du senditoj de la loka laborista organizo. Ili havis la jenan peton: „En nia organizo estas diversaj popolanoj, kiuj parolas germane, hungare aŭ rumanne, sed ni ne scias la lingvon unu de la alia. Ni aŭdis, ke vi uzas mondlingvon, kiun komprenas ĉiu.”

Kompreneble, temis pri la deziro lerni Esperanton. Lernolibroj ne estis haveblaj. La petita subpastro, tamen, elturniĝis. Li komencis instrui la diverslingvanojn per simpla konversacio. Naskiĝis tio, kion la esperantistoj konas kiel la „Ĉe-metodon”.

Ĝia aŭtoro estis András Cseh [ĉe]. Li tiam estis ŝtatano de Rumanio, sed la rumanan lingvon li neniam lernis. Simile kiel Zamenhof, li devenas el multnacia regiono kaj ne estas facile lin klasifi laŭ nacieco. Sed Transilvanio, kie Cseh kreskis, tradicie estis pli tolerema ol la regiono de Bjalistoko, kaj li estis eĉ malpli ol Zamenhof strikte ligebla al unu nacio. La avo estis ĉeĥdevena kaj nomis sin Ĉeĥ; pro profesiaj kaŭzoj li translokiĝis de Bohemio al alia angulo en la aŭstrahungara monarkio, al Transilvanio. Tie kunvivis hungaroj, germanoj kaj rumanoj. La patrino estis hungardevena; hejme oni parolis germane. Kiam Andreo naskiĝis (en 1895), la familia nomo estis jam hungarigita al Cseh.

La junaĝo de Andreo Cseh pasis en tempo de tempestaj ŝanĝoj post la militeksplodo de 1914. Fizike tro malforta por soldatservi, li komencis studi juron en Budapeŝto. Sed du jarojn poste li revenis al sia hejmlandregiono por ekstudii katolikan teologion. La prezento de Ed Borsboom kredigas, ke Andreon logis unuavice la perspektivo, ke kun la profesio de sacerdoto estas ligita ne tro da streĉo. Ĝi certe utilis por havi tempon por Esperanto, kiun li eklernis jam en 1911. La debutan naturmetodan instruadon en Sibiu sekvis la gvidado de kursoj en Cluj kaj la ĉefurbo

Bukareŝto. Li ankaŭ vojaĝis eksterlanden, kaj jam en 1924 pensis pri laboro por Esperanto ekster Rumanio. La episkopa superulo, lia granda favoranto, permesis al li liberiĝi de la sacerdotaĵo; komenciĝis alispeca „apostolado”, nome vojaĝoj tra eŭropaj landoj, dum kiuj Cseh faris verbajn prelegojn, kutime kun „prov-lecionoj” de sia metodo. Precipe sukcesaj estis lia partopreno en la Universala Kongreso en Dancigo (1927) kaj la posta prelegvojaĝo tra Svedio. Li sukcesis altiri mirige multajn novajn lernantojn de Esperanto pro unika miksaĵo de talentoj: Laŭ Borsboom, Cseh havis magian ĥarisman, li kvazaŭ lude instruis, sorĉis per anekdotoj kaj kapablis sen streĉo entuziasmigi homojn per/por Esperanto. Li, ne malplej grave, estis bonaspekta viro, kiun precipe junulinoj admiris, eĉ adoris.

Per la biografio de Borsboom ni ekscias multon pri la etoso de la Esperanto-movado antaŭ (kaj post) la dua mondmilito. Okazis konfliktoj; la oficiala movado emis suspekti lin pro lia troa memstareco. Sed se temas pri populareco inter ordinaraj esperantistoj, la aŭtoro prave metas Cseh kaj Julion Baghy sur la saman ŝtupon. Interesaj estas ankaŭ la karakterizoj de la ĉefaj kunagantoj de Cseh, la ege simpatia geedza paro Julia kaj Jan Isbrücker, la pradisĉiplo Tiberio Morariu, la klera judo Sigismundo Pragano (al kies konvinkipovo ankaŭ la recenzinto dankas sian esperantistiĝon), aŭ tiel malsamaj personoj kiel Lidja Zamenhof, George Alan Connor, Margarete Saxl kaj Jorge de Saldanha Carreira. Kiam Andreo Cseh en 1965 iĝis 70-jara, inter la gastoj de la festa akcepto estis Willem Drees, la eksa ĉefministro de Nederlando, unu el la miloj, kiuj lernis Esperanton en „Ĉe-kurso”.

Andreo Cseh, kiu mortis en 1979, „tiel insiste, trudĉarme elokventis, ke li kreis kvazaŭ hipnotan etoson”, skribas Ed Borsboom. La sama homo montris



severan disciplinon: En siaj kursoj li neniam mankis kaj neniam venis tro malfrue. Al lia personeco apartenas ankaŭ, ke li ne estis unu el la iom senkoloraj „neŭtraluloj”, kiuj regis la movadon inter la du mondmilitoj. Cseh, la „ferianta” pastro, estis iom maldekstremata. Dekomence li tre kritike rilatis al la nazia reĝimo en Germanio kaj malkaŝe publikigis sian opinion pri ĝia politiko kontraŭ Esperanto. En 1942, meze de la milito, li en la okupita Nederlando kuraĝis organizi sekretan kunvenon por fondi la mondfederalisman Universalan Ligon.


Ed Borsboom estas dankinda pro tiu ĉi biografio pri homo, kiu, kiel formulis la revuo *Esperanto* en nekrologo, „fariĝis legendo jam dum sia vivo”.

Ulrich LINS

Ed Borsboom: *Vivo de Andreo Cseh*. Eld. Internacia Esperanto-Instituto, Hago, 2003. 313 paĝoj. ISBN 90-805651-2-1.

Prezo ĉe FEL: 22,00 eŭroj + afranko.

Unika vortaro por lernantoj



Post la du etvortaroj pri *Laboro kaj lernado*, kaj *Lingvo kaj komunikado*, sekvas ĉi tiu tre konciza, preskaŭ enpoŝtebla, unika vortaro. La enhavo estas aranĝita laŭ temoj, ekzemple „Familiaroj, parencoj”, „Domo, loĝejo”, „Maljuneco kaj morto” kaj multaj aliaj. Ĉe ĉiu ĉeftemo estas aro da subtemoj, logike vicigitaj, kaj ĉe ĉiu subtemo sekvas utila aro da temoj kaj terminoj tiurilataj, ĉiu sur aparta linio. Ekzemple:

Ĉeftemo: „Junaĝo, geedziĝo”, kiun sekvas subtemo:

„junulo”, kiun sekvas subsubtemoj:
 „knabino, junulino, knabo, junulo”;
 „viziti malbonan societon”;
 „la tuta vivo estas antaŭ li”;
 „protesti/ribeli kontraŭ io”
 kaj post tio plia subtemo:

„junularo”, kiun sekvas subsubtemo:

„gejunuloj”
 „senzorga”

Unuarigarde, la tuto aspektas tute ĥaosa kaj malfacile komprenebla. Nu jes, tia ĝi estas, se oni uzas ĝin kiel ordinaran vortaron. Mankas difinoj, klarigoj, indekso. Sed nun pensu: Supozu, ke vi estas lernanto, kaj via tasko prepare por klaso pri la angla, esperanta aŭ hungara lingvo estas lerni utilajn ĉiutagajn vortojn por esprimi familiaraĵojn kaj kelkajn eble utilajn frazojn, utilajn, kiam oni diskutas tiujn familiaraĵojn. Por la hodiaŭa klaso oni lernas vortojn pri la junaĝo kaj geedziĝo. Krom la ordinarajn vortojn, kiujn instruas ordinara lernolibro, kiel trovi specifajn vortojn, rilatantajn al la temo „junaĝo kaj geedziĝo”?

La instruisto diras al vi: Lernu la vortojn en sekcio 4 de la vortaro pri „Homa vivo kaj loĝado”. Poste, en la klaso ni konversacios pri hejmaj aferoj kaj praktikos la uzadon de la vortoj, specife rilatantaj al tiu ĉeftemo.

Aŭ imagu alian situacion: Vi estas hungaro, studanta aŭtodidakte, kaj volas lerni la vortojn anglalingvajn kaj

esperantajn pri hejmaj aŭ familiaj aferoj, por tiel pligrandigi vian konon de la vortaro de tiuj du lingvoj. Sekcio 4 de la vortaro prezentas al vi, en paralelaj kolumnoj, zorge interagorditaj, la vortojn en la angla, en kolumno 1; en Esperanto, en kolumno 2; kaj la hungara en kolumno 3.

Por kiaj studentoj eble utilis ĉi tia vortaro? Nu, supozu, ke vi laboras en hungara meblbutiko kaj bezonas scii la anglalingvajn terminojn por multaj hejmaj mebloj, kiujn angle parolanta aĉetemo emas prienketi aŭ eble aĉeti. Nu, vi ja bezonas scii la anglalingvajn nomojn de la multaj mebloj en la butiko, ĉu ne? Kaj, eble, ĉar vi estas internaciemo, vi decidus lerni ankaŭ la esperantajn nomojn de la mebloj.

Aŭ, kompreneble, supozu, ke via propra lingvo estas nek la hungara, nek la angla, sed vi turismas en Usono aŭ en Hungario; konante la esperantajn nomojn de la koncernaj mebloj, kiuj interesas vin, vi povas antaŭstudi la anglajn aŭ hungarajn nomojn de tiuj mebloj, antaŭ ol viziti la meblbutikojn.

Subite oni komprenas, ke la nekutima aranĝo de temoj, subtemoj, kaj ceteraj en ĉi tiu etvortaro, anstataŭ esti arbitra kaj konfuza, tute male prezentas al vi ĝuste la terminojn, kiujn vi bezonas lerni, por via celo, laŭ tre facile utiligebla aranĝo.

Antaŭvidata estas serio da diversaj aliaj fakaj etvortaroj, tiel ke, iom post iom, konstruiĝos biblioteko da fakvortaroj, el kiuj oni povas elekti la deziratajn temojn por studi. Ĉar nur tri tiaj etvortaroj ekzistas jam nun, povas ŝajni, ke la elekto estas tre limigita. Sed iom post iom la elektoj plimultiĝos, kaj, espereble, la tuta serio tre helpe servos la praktikan utiligon de Esperanto kiel peranta lingvo en la ĉiutaga vivo.

Bone presita, fortika libreto, tre utila por siaj specialaj aplikiĝoj.

Donald BROADRIBB

Ilona Koutny: *Angla-esperanta-hungara etvortaro pri homa vivo kaj loĝado*. Eld. Prodrük, Poznań, 2005. 156 paĝoj gluitaj. ISBN 83-89887-109-3.

Prezo ĉe FEL: 10 eŭroj + afanko.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,



Frankrijklei 140,
 B-2000 Antwerpen, Belgio.
 Tlf. + 32 3 234 34 00;
 tlk. + 32 3 233 54 33;
 rete: retbutiko@retbutiko.net;
 skajpe fel-monato
 aŭ per www.retbutiko.net.

Mallonga historio de la evonima milito

Ĉar estas evidente, ke, post tiom da jaroj, multaj personoj ne precize konas la fonon kaj cirkonstancojn rilate al la milito inter Evonimo kaj Ponkano, mi decidis registri ĉi tiujn detalojn, kiel malgrandan kontribuon al la kronikoj de nia kara lando.

En la dua jaro de la dudeka nacia prezidanteco, okazis la internacia konferenco de Cacilhas por subskribi la samnoman traktaton pri kunlaboro ekonomia kaj milita inter la koncernaj landoj. Unu el la kondiĉoj postulataj de la plej potenca partnero, nome la Ponkana Unio, estis tio, ke, ĉiu subskribanta lando senkondiĉe akceptu la principojn de la okcidenta libera merkato, ponkana demokratio kaj senbrida kapitalismo. Tio precipe implikis, ke en tiuj landoj, kie ankoraŭ ekzistis iuj ajn ŝtataj entreprenoj, ili devis esti tuj privatigataj.

Dum la diskutoj, la ponkana reprezentanto minacis, ke estos gravegaj konsekvencoj por landoj, kiuj ne obeos ĉi tiun kondiĉon; alie, ekzistas la ebleco, ke la viruso de komunismo refoje estiĝos en ĝia zono de influo, kaj kapablos infekti la tutaĵon. Li klarigis, ke laŭ la difino akceptita de sia registaro, la termino *komunismo* kompreneble inkludas ĉiujn rilatajn ideologiojn, i.a. socialismon, laboristan solidarecon, liberalismon, kooperativismon, mutualismon, kaj egalrajtisman.

Nia reprezentanto ĉe la konferenco asertis, ke, kvankam preskaŭ ĉiuj el la publikaj servoj en nia respubliko (de transporto, poŝto, sano, radio, televido, elektro, gaso kaj akvo) estas provizataj de ŝtataj instancoj, kaj entreprenoj do apartenas al la popolo kaj ne rajtas esti privatigataj, tio ne povas prezenti minacon al la integreco de la aliaj subskribantoj. Li emfazis, ke malgraŭ la fakto, ke nia lando ne estas la plej malgranda en la mondo (pli malgrandaj estas, ekzemple, Vanuatuo, Tuvalo, Lihtenŝtejno kaj San-Marino), ĝi ja estas tro eta por iĝi fokuso de malintegriĝo.

Estas evidente ke, kontraste kun nia lando, la Ponkana Unio estas giganta. Por tiuj, kiuj malmulton scias pri geografio de nia planedo, mi donu kelkajn detalojn ĉi-rilate. Ponkano okupas la plej grandan loĝeblan parton de insulego aŭ pli ĝuste kvazaŭan kontinenton inter Kazohinio kaj Dalfunto. La plimulto de la loĝantoj estas altstaturaj kaj de pli vasta ĉirkaŭmezuro ol la indiĝenoj de tiuj najbaraj landoj. Ili nutras sin precipe per fiŝoj, porkaĵoj, fazeoloj kaj dolĉaĵoj. Tiom estas ilia konsumo de la laste menciita, ke granda proporcio suferas de diabeto, sed alie ili estas forta kaj sana popolo. La lando estas riĉa pro agrikulturo kaj industrio, sed ĝia ekonomio precipe dependas de financaj institutoj kaj de tiel nomataj *muzikaj bankoj*, similaj al tiuj priskribitaj en la romano *Erevono*, de la angla aŭtoro Samuel Butler. Ĝia armeo estas la plej granda en la mondo.

Post tiu klariga parentezo, ni revenu al nia temo, nome la intertraktado ĉe la konferenco en Cacilhas. La ponkana reprezentanto rifuzis akcepti la sintenon de nia registaro rilate al ĝenerala

privatigo de publikaj servoj. La konsekvenco estis tio, ke la plej potenca partnero en la grupo de subskribantaj nacioj decidis ataki nian liliputan landon por „liberigi nian popolon de la jugo de ŝtatismo”. Tiel komenciĝis la unua kaj espereble la lasta milito inter nia Serenega Respubliko de Evonimo kaj la Ponkana Unio.

Nia registaro kunvenis por decidi, kiel rezisti tiun kolosan malamikon. Profesia armeon ni ne posedas. Nia mararmea floto konsistas el unu fiŝejprotektita ŝipo, unu rapidboato kaj du remboatoj sur Lago Novalo. Ni havas unu aviadilon, sed ĝi ne portas armilojn. Do ni ekpisis niajn kuraĝajn volontulojn per pafiloj, kaj postenigis ilin sur la suda flanko de la lando. Niaj militaj fakuloj kalkulis, ke la malamiko ne invados tra la okcidenta lago, nek tra la Neĝaj Montoj en la nordo, nek el la oriento. La sola facila enirejo estus tra la ponto super la suda etendaĵo de la Brozna Rivero. Granda nombro da volontuloj do staris pretaj laŭ la riverbordo, kun fiksitaj bajonetoj, atendantaj invadon el la sudo. ▶

 **Mapo de la Serenega Respubliko de Evonimo**



► Ponkano transportis per siaj jeta-viadilegoj grandan kvanton da soldatoj, tankoj, alteriĝaj boatoj kaj alia militmaterialo al la landlimoj de nia respubliko. Evidente ĝi decidis ne uzi bombaviadilojn, ĉar en Evonimo ne estas grandaj urboj, industriaj instalaĵoj aŭ similaj strategiaj celoj. Niaj centroj de loĝado estas nuraj vilaĝoj. Ni posedas nur unu fervojan linion inter Skandro, nia ĉefvilaĝo Borova, kaj la nordorienta finstacio Volova. Finfine, eĉ la tankoj ne eniris nian landon, ĉar la ponkanoj, kiuj ne estas aparte kruelaj homoj, ne volis pisti kaj premmortigi niajn defendantajn volontulojn, kies armiloj estis nuraj maldormaj pafiloj kaj bajonetoj. En tiu afero, la ponkanoj montris iom da sporta lojaleco.

Nia registaro, tamen, ne intencis trakti la militon kiel futbalmatĉon. La milita konsilantaro decidis apliki iun ajn taktikon – eĉ la plej nekonvencian – kontraŭ la malamiko. Ĉar la Serenega Respubliko ne estas subskribinto de la Ĝeneva Konvencio, kaj Ponkano plurfoje malrespektis ĝin, ni agis drakone. Niaj policanoj kaptis kelkajn ponkanajn skoltojn, kiuj sukcesis trapasi la landlimon kaj enŝteliĝi en la landinternon. En la ponkana armeo tute mankis interpretistoj aŭ lingvoinstruistoj, kaj neniu ponkano parolis nian lingvon, do estis facile rekoni la entrudiĝintojn. Pri traktado de la kaptitoj, nia registaro imitis metodon uzatan de la ponkanoj dum alia milito. Ĝi deklaris la skoltojn ne laŭleĝaj soldatoj, sed „neleĝaj malamikaj batalantoj” kaj transportis ilin al provizore konstruita malliberejo sur insulo en Lago Novalo. Tie oni vestis ilin per ĉielarko-koloraj kompletoj, ligis iliajn maleolojn per pezaj ĉenoj, metis ilin en tigrokaĝojn (pruntitajn de la zoologia ĝardeno en Borova, sed kompreneble sen tigroj), kaj nutris ilin per avenkaĉo kaj similaj sanaj kaj bongustaj manĝaĵoj. La ponkanoj mem malkovris, ke tiuj, kiuj manĝas avenkaĉon, longe vivas kaj ĝuas eksterordinaran bonan sanon.

Dum la ekzercadhoroj en la korto de la malliberejo, la gardistoj devigis la malliberulojn nudpiede marŝi tien kaj reen sur cementplanko dum konstanta kantado de nia nacia himno. Ĉar ni

estas humana popolo, oni ne postulis, ke ili kantu la tekston en nia malfacila lingvo aŭ en eĉ pli malfacila Esperanto, sed provizis ilin per ponkana traduko. Tio certe estis granda senpezigo por la kaptitoj. Samtempe, ĉiu kaptito ricevis senpagan ekzempleron de la skribaĵoj de la inspira verkisto Norman Vincent Peale. Estas atestaĵo pri la senpartia konduto de niaj aŭtoritatoj la fakto, ke kiam unu el la malliberuloj malrespektite traktis tiun noblan tekston, li estis severe punita.

Tamen, ankoraŭ restis la grava problemo: kiel defendi nin kontraŭ tiom forta malamiko? La solvon trovis d-ro Vanĉo Arnam, direktoro de la centra malsanulejo en Borova. Antaŭ nelonge estis publikigitaj en la monda gazetaro maltrankviligaj raportoj pri grava morbo nomata *hipertrikoza febro*, kiu unue aperis sur insulo en la Pacifika Oceano, kaj estas senescepte mortiga. Neniu kuracilo aŭ antidoto estas efika kontraŭ ĝi. La bona doktoro legis la raportojn kaj plie konstatis, ke la ponkanoj ege timas, ke tiu malsano eniros ilian landon kaj kaŭzos epidemion. Do li proponis, ke oni uzu tiun timon kiel armilon. Sekve, la aŭtoritatoj rekrutis grandan nombron da rekrutoj, kiuj devis vesti sin kiel kuracistoj, geflegistoj, pastroj kaj funebraĵistoj. Sur la enirejo de unu alo de ĉiu malsanulejo oni pendigis dulingvan anoncon en la evonima kaj la ponkana, indikantan, ke tie estis kvarenteno pro hipertrikoza febro. En ĉiuj vilaĝoj, la falsaj kuracistoj kaj flegistoj vizitis domojn ŝajnigante, ke ili serĉas viktimojn de la morbo. Ĉe la landlimo establiĝis sanitara kordono. En ĉiuj tombejoj, la „pastroj” kaj „funebraĵistoj” ceremonie enterigis malplenajn ĉerkojn. Policistoj rondiris sur la stratoj kriegante dulingve „Danĝero! Febrorisko!” Kompreneble, la loĝantaro jam estis informita per flugfolioj en la evonima lingvo (kiun neniu ponkano kapablas kompreni), ke temis pri artifiko, ne realaĵo. Multaj evonimanoj, precipe infanoj, tre amuzis sin ŝajnigante sin febraj pacientoj. Kelkaj eĉ surmetis barbojn kaj longharajn perukojn, ĉar nemormala hara kaj vila kresko estas rigardata kiel unu el la simptomoj de tiu morbo.

Verdire, post la fino de la milito, ne eblis trovi pruvojn, ke hipertrikoza febro fakte ekzistas. Intertempe, la ruzo estis multe pli sukcesa ol povis esperi la evonimanoj. Nia volontula armeo kaptis multajn ponkanajn spionojn. Tiujn oni ne sendis al la mallibereja tendaro sur la laga insulo por pasigi la Kristnaskon kun siaj samlandanoj, sed malliberigis ilin ĉe la landlimo, kaj lasis ilin reiri al la ponkanaj vicoj por rakonti pri la terura epidemio en la respubliko. La efiko estis tuja. La ponkanoj replenigis siajn aviadilegojn per soldatoj, tankoj kaj alia militmaterialo, kaj refluĝis al sia lando sufiĉe frue por povi ĝui la vintrajn festojn kune kun siaj familianoj kaj amikoj.

Feliĉe, ambaŭflanke neniu mortis kaj neniu vundiĝis. Kelkaj el la plej venĝemaj membroj de nia parlamento volis reteni dum nedefinita periodo (eĉ eble tutvive) la malliberigitajn malamikajn batalantojn sur la insulo, kaj pridemandi ilin dum torturo. Tio ne eblis, ĉar en nia lando mankas torturistoj, kaj ne estus praktike sendi kaptitojn al niaj najbaroj en Juglando, kie la ofico de torturisto estas respektata profesio. Plie, la evonimaj civitanoj, kiuj estas afablaj kaj humanaj homoj, insistis, ke eĉ niaj malamikoj estu permesitaj kuncelebri la jarfinajn festivalojn kaj la nacian feston (Pantagruelan Tagon) en sia lando. Do ĉiuj estis pardonitaj kaj repatrujigitaj je la granda ĝojo de la ordinaraj ponkanoj, kiuj neniam tutkore apogis la militon. Kiel ĉiuj normalaj personoj, ili multe pli ŝatas manĝi kaj amori ol batali kaj mortigi. Do, je la fino, la du landoj pli malpli amikiĝis, kaj neniu el niaj publikaj servoj aŭ ŝtataj entreprenoj estis privatigitaj. Oni decidis finfine, ke ĉiu lando rajtas elektisian proprajn ideologion kaj politikan sistemon.

Tiel finiĝis la plej glora epizodo en la historio de nia Serenega Respubliko. D-ro Arnam estis honorigita per la plej alta ordeno de nia nacio, nome la Kruco de la Ora Marmoto kun Kverkaj Folioj kaj Purpura Rubando, kaj per statuo en la centra placo de ĉiu vilaĝo. Eterne vivu la Serenega Respubliko de Evonimo!

Albisturo KVINKE

BELGIO

Genealogio

Genealogoj esploras la devenon kaj parencecon de familioj. Nuntempe genealogio estas ŝatokupo de fervoraj amatoroj. La ekesto de komputilo kaj Interreto draste ŝanĝis la labormetodojn kaj serĉeblecojn.



RODRIGO SEPULVEDA SCHULZ

En ĉiuj epokoj kaj regionoj la homoj opiniis, ke gravas koni siajn antaŭulojn, ekzemple pro religiaj kialoj aŭ por altigi la personan prestiĝon, pruvante, ke oni devenas de iu gravulo. La labormetodoj malsamas. Ĉu estas nur buŝa tradicio aŭ ĉu ekzistas dokumentoj? Ĉu la dokumentoj kovras longan, kontinuan periodon aŭ ĉu multo perdiĝis kaj restis nur fragmentoj? Ĉu ili estas alireblaj kaj legeblaj? La sekvanta priskribo validas nur por Belgio kaj la najbaraj okcident-eŭropaj landoj. En aliaj regionoj la kompilo de genealogio povas esti tute malsama, pli aŭ malpli facila, depende de politikaj, kulturaj kaj religiaj cirkonstancoj.

Fidindaj informoj

Estas du gravaj datoj por genealogoj. La koncilio (kunveno de episkopoj) de Trento (1545-1563) ordonis, ke ĉiujn baptojn, geedziĝojn kaj entombigojn oni devas noti en registroj. Tiu ordono kompreneble validis nur por tiu parto de la kristanaro, kiu estis regata de la papo en Romo, kaj ĝi efektiviĝis nur post kelkaj jardekoj. La registrojn oni faris kaj konservis en paroĥoj kaj multo dependis de la zorgemo de paroĥestroj.

Alia aro da reguloj ekestis post la Franca Revolucio (1789). Per ili oni transdonis la respondecon por la registrado de naskiĝoj, geedziĝoj kaj mortoj de religiaj al civilaj aŭtoritatoj, de paroĥoj al komunumoj aŭ urboj (kvankam la paroĥoj ĝis nun daŭrigas la registradon, ĝi ne plu havas civiljuran validecon). Nur post la jaro 1800 la registrado fidine okazis. Eblas konkludi, ke ekde la 17a jarcento ekzistas ĝenerala registrado de ĉiuj loĝantoj. La kvalito de la registrado iom post iom progresas, sed oftas mankoj ĉirkaŭ la jaro 1800, kiam la religia registrad-sistemo estis perturbita kaj la nova civila sistemo troviĝis en konstrufazo.

Estas sufiĉe simple retrovi siajn antaŭulojn ĝis la jaro 1800 kaj kun iom pli da peno eĉ eblas reiri ĝis 1600. Sed ĉu eblas fosi ankoraŭ pli profunde? Grava familio ja povas havi proprajn arkivojn, per kiuj eblas trastudi multajn jarcentojn reen. Kontraŭe, de malriĉa familio verŝajne ne restas iu spuro. Pri mezklasaj familioj ofte en la urbaj arkivoj troveblas informeroj, ĉar ili ekzemple partoprenis militon, ĉar ili estis partio en proceso, ĉar ili vendis aŭ aĉetis domon, ktp. Tiel eblas kompletigi sian genealogion, sed la rezulto

ne nepre fidindas. Aktuala ekzemplo el mia urbo estas la esploroj pri Jan Breydel [brejdl], fama figuro el milito inter Flandrio kaj Francio en la jaro 1302 (la „batalo de la oraj spronoj”, konata ĉe historiistoj kiel la „batalo de Kortrejko”). Arkivistoj trakribis la dokumentojn, sed hezitas indiki la „veran” Jan Breydel, ĉar en tiu epoko estis tre multe da personoj kun la sama aŭ simila nomo.

Kie trovi la dokumentojn?

Komence necesas klarigi, ke la dokumentoj de la lastaj cent jaroj ekzistas, sed publike ne alireblas. Nur familianoj aŭ esploristoj, kiuj ricevis specialan permeson, povas konsulti ilin. Tiurilate nun estas kontraŭaj starpunktoj. Unuflanke oni volas garantii la privatecon de personaj donitaĵoj kaj eĉ emas plilongigi tiun periodon. Aliflanke la genealogoj opinias tion sensenca, ĉar la dezirataj informoj plejparte troveblas ankaŭ aliloke (ekzemple en gazetoj), sed nur pere de pli pena serĉado.

Principe ĉiuj paroĥaj kaj civilaj registroj troveblas en la ŝtata arkivo, kiu havas filiojn en la tuta lando. Ne eblas konsulti la originalojn, sed oni povas spekti mikrofilmojn. Novbakita genealogo malfacile trovos sian vojon en ►

► tiuj arkivoj. Tre utilas komence aliĝi al genealogia asocio por alkutimiĝi al esplormetodoj. Pli kaj pli da urboj kaj komunumoj revalorigas siajn arkivojn kaj helpas esploristojn. Ili ankaŭ komencas (instigitaj de specialigitaj kompanioj) skani la dokumentojn kaj disponigi ilin en komputila formo. Ofte la cirkonstancoj estas pli bonaj en urbaj ol en ŝtataj arkivoj.

Skribo kaj lingvo

La vera laboro komenciĝas, kiam oni trovis la deziratan paĝon en reg-

istro. Manskribo de antaŭ kelkaj jarcentoj konsiderinde malsamas de la nuntempa, kaj necesas lerni legi ĝin. La paroĥaj registroj estas en la latina lingvo kaj estas bezonata malgranda vortprovizo de tiu lingvo, por povi kompreni la ĉefan enhavon. Alia obstaklo povas esti, ke pro politikaj cirkonstancoj iama lingvo de regiono nun ne plu estas uzata. En „belga” Flandrio ofte la tekstoj el la 19a jarcento estas en la lingvo de tiam reganta klaso, la franca, kaj ne en la popola lingvo. Aliflanke, en „franca” Flandrio (norda Francio)

abundas dokumentoj el la 17a kaj 18a jarcentoj, sufiĉe bone kompreneblaj por nederlandlingvanoj, sed tute neklaraj por francparolantoj. Atentindas, ke la skribo de nomoj, eĉ ĝis la 20a jarcento, ne estis tute fiksita. Povas esti sufiĉe gravaj diferencoj en la skribo de sama familia nomo.

Komputilo kaj Interreto

Kun la persona komputilo ankaŭ venis programoj por fari genealogion. Nun eblas pli detale registri kaj pli detale trovi informojn ol per la tradiciaj sliparoj kaj libretoj. Eĉ maljunaj genealogoj kunportas sian porteblan komputilon al arkivo kaj per ĝi transskribas dokumentojn. Multloke ekestas projektoj por registri en komputilo ĉiujn naskiĝojn, geedziĝojn kaj mortojn de iu regiono. Tiel la serĉlaboro multe faciligas. Bona ekzemplo estas la nederlanda ISIS (www.zeeuwsarchief.nl/newframe.htm?isis/isis.htm).

Interreto paŝon post paŝo forigas la individuecon de genealogoj. Ĝis nun multaj genealogoj avide konservas la rikoltitan materialon por si mem. Ili opinias, ke ili per multe da peno akiris la informojn, kaj ke aliaj faru la samon. Kun la ekesto de Interreto venis nova, multe pli helpema generacio. Ekzistas diskutgrupoj, en kiuj eblas peti kaj interŝanĝi informojn kaj iĝas kutimo aperigi sian genealogion en retpaĝo. Por interŝanĝi informojn inter diversaj genealogiaj programoj oni kreis la komunan GEDCOM-dosierformon (.ged).

Ĉu en Esperanto?

Verkante tiun tekston, mi rimarkis, ke apenaŭ ekzistas genealogiaj terminoj en Esperanto. Mi ne trovis libron pri la temo, kaj ĝis nun mi neniam renkontis Esperanto-parolantojn en genealogiaj rondoj. Plej interesaj rezultoj de interreta serĉado estas la *Genealogia Societo Worsten* (worsten.org) kaj *Asocio Genealogia Alleum* (alleum.org) kun revuo *Alleum*. Ambaŭ ŝajnas esti daŭrigo de la laboro de Edward Woytakowski [edvard vojtkovski] el Wrocław [vrocŭav], Pollando.

Roland ROTSAERT

Deveno de A.J. WITTERYCK, belga eldonisto kaj esperantisto (nur laŭ patra flanko; informoj kolektitaj surbaze de facile atingeblaj fontoj, nepre ankoraŭ kontrolendaj)

Antoon Jozef (Antoine Joseph) WITTERYCK *Oostkamp 1865.06.06 +Steenbrugge (= Brugge, = Assebroek) 1934.07.03	x 1890.11.11 Brugge	Hélène Colette Aimée DELPLACE *1859
Richard (Richardus) WITTERYCK * Torhout 1838.07.21 +1916 instruisto	x 1860.11.15 Oedelem	Juliana DAVELOOSE *Oedelem 1833.01.17 +Steenbrugge 1923.05.02 agrikulturistino
Petrus (Pieter) WITTERYCK (WITTERIJCK) *Torhout 1813.03.18 +Torhout 1850.06.27 laboristo	x (1a) 1838.04.27 Torhout	Maria Theresia (Marie Thérèse) ROOSE *Torhout 1814.12.11 +Torhout 1848.03.17 kudristino
Louis WITTERIJCK *Zwevezele 1770.04.01 +Torhout 1837.09.02 laboristo	x 1816.12.18 Torhout	Joanna (Jeanne Claire) VANDENBERGHE *Ichtegem 1777.02.28
Jean WITTERYCK +Torhout 1800.12.15	x	Godelieve DE RIEMAEKER (RIEMAEKER) +Torhout 1791.05.20

ANONCETOJ

...**jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko? Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe www.retbutiko.net.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespond-amikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiunonata soci-kultura revuo en Esperanto

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

LA ONDO
DE ESPERANTO

Abonebla kontraŭ
27 EUR,
30 USD aŭ egalvaloro
ĉe UEA, FEL, ELNA,
UFE, EAB, SEF kaj
dudeko da aliaj landaj
perantoj.

- * Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- * Tra Esperantujo
- * Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikajoj
- * Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- * Historio kaj kulturo de Esperanto
- * Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- * Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- * Literatura suplemento jarfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

1kk@free.fr

4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ:

Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.



Abono: 22 €

(EKDE 14 EN KELKAJ LANDOJ)

Jacques Le Puil,
pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp

Komencanto

komencanto@r66.ru

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj.
Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998 — Formato A4, 16 paĝoj

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldoni + 2 eŭroj.

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo: www.komencanto.narod.ru

Abonu ĉe UEA
aŭ ĉe via landa peranto

Poŝta adreso: KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg, 620041 Rusio

finfine reaperis...

4a adaptita eldono

Grammaire

ABC

d'espéranto

Christiane De Vleminck et
Émile Van Damme

krozu nun al
www.retbutiko.net
kaj mendu hodiaŭ!